

458369

# LA LIRO

## DE LA ESPERANTISTOJ.



KOLEKTO DA VERSAJOJ  
EN LA LINGVO INTERNACIA  
„**ESPERANTO**“.

ELDONIS  
**A. GRABOWSKI.**



**NURNBERG**

W. Tümmel's Buch- und Kunstdruckerei.

1893.



Al la Amikoj-Esperantistoj

dediĉas

A. Grabowski.

## Al la Legantoj.

---

Anta' vi, Amikoj-Esperantistoj, kuŝas tuta libro de kantoj, tuta granda bukedo el la printempaj floroj de nia juna internacia poezjo.

Longe ed diligente mi kolektadis la materjalon por la «Liro», hodie prezentas kun ĝojo la pretan libron al nia amika rondo, ed esperas, ke lo estos akceptita afable kiel nova ed grava akiro de la literaturo Esperanta.

Se iam ni aŭdis l'antajuĝon, ke lingvo internacia ne povos taŭgi por la poezjo — la Liro fine ed plej bone pravas la kontraon; — se oni esprimis la opinjon, ke lingvo internacia ne bezonas poezjon, per la Liro vidiĝas en ligita parolado plej bone la forto, fleksebleco ed eŭfonia de nia lingvo, ed kio estas pli grava, la Liro montras, en kiel alta grado poezjo perfektigas lingvon:

La silaba severe mezurita longeco de versoj, la elektado de vortoj belsonaj, loja harmonja dismetado en ritmaj grupoj de troĥeoj, jamboj, daktiloj, amfibraĥoj ed anapestoj, la entranĉoj cezuraj, la rima kunsonado de vortoj, la serĉado de novaj rimoj ed la evitado de la monotonaj, rimoj sufiksaj, per unu vorto la tuta artista tehniko aparato de la formo influas forte sur la enhavon ed kaŭzas, ke la poeto, devigita ĉiam zorge elektadi inter la diversaj eblaj manjeroj de la esprimo de sia penso — formas novajn retorajn figurojn

ed pentraĵojn ed riĉigas la frazeologjon per lertaj mallongaj ed precizaj turnoĵoj de parolado, kiuj poste fariĝas anke l'akiro de la prozo ed de la lingvo de la ĉjutaga vivo.

La vastiĝo ed enfluo de la lingvo Esperanto kreskos unutempe kun la kresko ed disvolvo de la bela literaturo; kondamni la lingvon de la komenco esti nur ĵargono komercista, signifas tion saman, kiel subfosi la estontecon de la lingvo.

Mi diris, ke en poezjo montriĝas la beleco de lingvo, sed mi devas anke aldoni, ke tiel same en poezjo estas sentata la plej facile ĉiu akraĵo, ĉiu sono malpli pura. Tial sekvante en la prozaj, de mi ĝis nun eldonitaj verketoj, la oficjalen stilon de nia Majstro, mi ne povis kontrastari al la tento, agordi en poezja kolekto kelkajn tonojn terure dissonantajn en la harmonjo de Esperanto, forigi laŭ eblo, kie mi povis, la nenaturan akcenton de vortoj, kiu ofendas ĉiun instruitan, pli delikatan orelon. (Komparu ekzemple: baldaŭ, hiéraŭ, hodiaŭ, regúlo, nebúlo, okúlo, ebéna, sukéro, azéno, radío, linío, lilío, Germanújo, patrújo, kaj kiaj, ĝi fariĝis edc.)

Ne volante atendi tro longe ian aŭtoritan akademjon, (ĉar ne akademjo sed verkistoj perfektigas lingvon ed nia lingvo anke ne estas la kreo de ia akademjo, sed de unu genjala homo), mi faris tion, kio de longe ĉjuflanke estis sentata ed vane proponata.

Tamen mi ne rompís la unuecon de la lingvo, ne tuŝís la gramatikon, ne ŝanĝís la vortaron; kun escepto de la pli internacia ed pli bonsona ligilo «ed» en loko de la malfeliĉa greka «kaj», mi enkondukis neniun vorton novan. — Kiel en la antikveco la komuna lingvo greka (*κοινή διάλεκτος*) ne estis

signife alje formita per la multaj diversaj dialektoj, tiel same la lingvo internacia Esperanto restos ĉiam komune komprenebla kun tiaj fonetikaj deklinoj kiel la faritaj de mi en la Liro. —

La tutan reformon mi faris tre singarde: per sola helpo de-l' apostrofo ed per aldono de surdiga pjedeto al la vokalo «i», kiu transformiĝis en la nur iom pli mallonge sed simile sonantan, nesilaban konsonantan «j».

Tiamanjere:

1) Per l'apostrofo la sovaĝaj sonoj: aŭ, aŭi, aŭu, aŭe, iaŭ, iaŭe estas forigitaj.

2) Per helpo de «j», la ofte uzataj pronomoj kunrilataj: kiu, kio, kie, kiel, tiel edc. fariĝis laŭ bezono unu-aŭ dusilabaj\*). (NB. la proponita apostrofo en loko de «i» en tiuj vortoj enkondukus formojn dusencajn ed konfuzon en lingvo ed vortaro.)

3) Dank' al apostrofo ed al la konsonanta «j» multaj vortoj rericevis la naturan sonon ed akcenton ed fariĝis per unu silabo pli mallongaj. (Komparu ekzemple: neb'lo, ok'lo, reg'lo, speg'lo, suk'ro, az'no, eb'ne, radjo, familjo, papiljo, nacjo, hodj'e, hjer'e, German'jo, Franc'jo, Ital'jo patr'jo edc.)

4) La kunmeto de «l'» kun «o» donis l'o = lo (itale-hispana), egalsignifan kun la malbela, senpatr'ja «ĝi», kiu ĉe renkontado kun «iĝ» kaŭzis veran kakofonjon.

5) Fine la enkonduko de «ed» en loko de la gorĝa «kaj», egale finiĝanta kiel la pluralo de-l' adjektivoj,

---

\*) En loko de «iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu» la sistemo de nia lingvo permesas anke skribi: «i', ki', ti', ĉi', neni'»; tiam nur la signo de proksimeco «-ĉi» bezonus alian formon, ekz.: «sa» (ça france); sekve estus: tiu-ĉi = ti'-sa, (this, diese[r], angle-germane), tie-ĉi = tie-sa aŭ tute simple „sa“.

faris ke la monotonjo de la lastaj, interrompita per «ed», nun multe malpli estas sentata, ed ke nun la plurala formo de-l' adjektivoj povas resti netuŝita, kun granda utilo por la libereco de vortametado.

Entute dank' al la kelkaj ŝanĝetoj, kiuj povas eĉ esti rigardataj kiel poezja libereco, nia lingvo sonas nun en la Liro multe pli bele, pli harmonje. Ĉiu leganto, kiu volas konvinkiĝi pri la vereco de lo dirita, bezonas nur ekprovi la legadon de la versaĵoj laŭ la malnova manjero ed li tuj eksentos la grandegan diferencon.

Pri la stilo de la Liro mi malfermas voĉodonadon de nia Ligo (Rigardu N-ro 1/37 de-l' Esperantisto), ed petas la Amikojn-Esperantistojn esprimi al mi ilian opinionon pri la diritaj reformoj, sendadi ilian «por» aŭ «kontra» sub mia sube donita adreso.

En espero, ke ĉiuj estimataj legantoj partoprenos en la voĉodonado, kies rezultato estos leĝodonanta por la stilo de nia centra organo, mi restas kun kora saluto internacja.

**Ivanovo-Voznesensk.**

(Rus'jo, Vladimira gubernjo.)

**A. Grabowski.**

## 1.

### Al la „Esperantisto“.

---

En bona hor'! Ni aŭdis la signalon  
Ed\*) bataleme saltas nia koro.  
Konduku nin, komencu la batalon  
Sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,  
Salutas vin, ho nia luma stelo!  
Konduku nin, senhalte ed sentime,  
Al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estos nia vojo  
Ed ne malmulte ank'e ni suferos;  
Sed batalante, kun plej granda ĝojo  
Senhalte ni laboros ed esporos.

For estas jam la baroj de-l' komenco,  
L'unua muro estas trarompita,  
Ed dolĉa estos nia rekompenco,  
Kiam la celo estos alvenita.

Dr. Ludvik Zamenhof.

---

\*) Ed (kaj). Itale.





## L' Espero.

---

En la mondon venis nova sento,  
 Tra la mondo iras forta voko;  
 Per flugiloj de facila vento  
 Nun de loko flugu l'o\*) al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
 L'o la homan tiras familion:  
 Al la mond' eterne militanta  
 L'o promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de-l' espero  
 Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
 Ed rapide kreskas la afero  
 Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
 Inter la popoloj dividitaj;  
 Sed dissaltos la obstinaj baroj  
 Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
 Komprenante unu la alian,  
 La popoloj faros en konsento  
 Unu grandan rondon familian.

---

\*) lo (ĝi). Itale, hispane.

Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos  
Ĝis la bela sonĝo de-l' homaro  
Por eterna ben' efektivigo.

Dr. Ludvik Zamenhof.



### 3.

## Al la fratoj.

Forte ni staru, fratoj amataj,  
Por nia sankta afero!  
Ni bataladu kune tenataj  
Per unu bela espero!

Regas ancor'e nokto sen luno,  
La mondo dormas obstine,  
Sed jam leviĝos bald'e la suno  
Por lumi, brili senfine.

Veku, ho veku, veku konstante,  
Ne timu ridon, insulton!  
Voku, ho voku, ripetadante,  
Ĝis vi atingos aŭskulton!

Dekon da fojoj vane perdiĝos  
La voko via ridata, —  
La dekunua alradikiĝos,  
Ed kreskos frukto benata.

Tre malproksime ĉiuj ni staras  
La unu de la alia . . .  
Kie vi estas, kion vi faras,  
Ho, karaj fratoj vi miaj?

Vi en la urbo, vi en urbeto,  
En la malgranda vilaĝo,  
Ĉu ne forflugis kiel bloveto  
La tuta via kuraĝo?

Cu vi sukcese en via loko  
Kondukas nian aferon,  
Aŭ eksilentis jam via voko,  
Vi lacaj perdis esperon?

Iras senhalte via laboro  
Honeste ed esperante?  
Brulas la flamo en via koro  
Neniam malfortiĝante?

Forte ni staru, brave laboru,  
Kuraĝe, ho nia rondo!  
Nia afero kresku ed floru  
Per ni en tuta la mondo!

Ni l'on kondukos ne ripozante  
Ed nin lacigos nenio;  
Ni l'on traportos, sankte ĵurante,  
Tra-l' tuta mondo de Dio!

Malfacileco, malrapideco  
Al ni la vojon ne baros.  
Sen malhonora malkuraĝeco  
Ni kion povos ni faros.

Staras ankor'e en la komenco  
La celo en malproksimo, —  
Ni l'on atingos per la potenco  
De nia forta animo!

Ni l'on atingos per la potenco  
De nia sankta fervoro,  
Ni l'on atingos per pacienco  
Ed per sentima laboro.

Gloro la celo, sankta l'afero,  
La venko — bald'e l'o venos;  
Levos la kapon, ni kun fiero,  
La mondo ĝoje nin benos.

Tiam atendas nin rekompenco  
La plej majesta ed riĉa:  
Nia laboro ed pacienco  
La mondon faros feliĉa!

Dr. Ludvik Zamenhof.



## 4.

Mia penso.

Sur la kampo, for de-l' mondo,  
 Anta' nokto de somero,  
 Amikino en la rondo  
 Kantas kanton pri-l' espero.  
 Ed pri vivo detruita  
 Ŝi rakontas kompatante, —  
 Mia vundo refracita  
 Min doloras resangante.

«Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,  
 Kial tia senmoveco?  
 Ha, kredeble rememoro  
 El la kara infaneco?»  
 Kion diri? Ne ploranta  
 Povis esti parolado  
 Kun fraŭlino ripozanta  
 Post somera promenado!

Mia penso ed turmento,  
 Ed doloroj ed esperoj!  
 Kiom de mi en silento  
 Al vi iris jam oferoj!  
 Kion havis mi plej karan —  
 La junecon — mi ploranta  
 Metis mem sur la altaron  
 De la devo 'ordonanta!

Fajron sentas mi interne,  
Vivi ank'e mi deziras, —  
Io pelas min eterne,  
Se mi al gajuloj iras . . .  
Se ne plaças al la sorto  
Mia peno ed laboro —  
Venu tuj al mi la morto,  
En espero — sen doloro!

Dr. Ludvik Zamenhof.



5.

## Ho mia kor'.

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for!  
Jam teni min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!  
Sufiĉe! trankviliĝu de-l' batado,  
Ho, mia kor'!

Dr. Ludvik Zamenhof.



## 6.

### La vojevodo.

(El Mickiewicz.)

---

En vespero somera vojevodo kolera  
Al la hejma kastelo rapidas;  
Al la lito edzina kun teruro senfina  
Li alvenas, — neniun li vidas.

En doloro brulanta ed per mano tremanta  
Sian grizan lipharon li prenis,  
De la lito foriris, la manikojn retiris  
Ed ektondris — kozako alvenis.

«Kial, best' abomena, mia pordo ĝardena  
Restas nokte sen hundo, sen gardo?  
Prenu tuj mian sakon ed pafilon kozakan  
Ed silente min sekvu, bastardo!»

Kun pafil' en la mano al ĝardena altano  
Ili amb'e sen bru' alŝteliĝas.  
Sur la benka herbajo ia lumas blankajo:  
En tolaĵo virino vidiĝas.

Unu manon levinte, la okulojn kovrinte,  
Per la dua forpuŝi ŝi penis  
Unu viron petantan, surgenuie starantan,  
Kiu nun en la brakoj ŝin tenis.

Ed en flama fervoro li parolis: «Ho, koro,  
Ĉu jam ĉio por ĉiam perdita?  
Eĉ la premoj de-l' mano per la mon' de-l' tirano  
Ĉiuj estas jam foraĉetitaj?

Mi vin tiel amadis, por vi tiel bruladis, —  
Malproksime nun plori mi devas;  
Li ne amis, ne ploris, nur per mon' eksonoris, —  
Ed li ĉion por ĉiam ricevas.

Sur la brusto anĝela lia kapo malbela  
En dorloto de nun ripozados,  
De la roza buŝeto, de la ruĝa vangeto,  
Li ĉielan feliĉon suĉados.

Sur ĉevalo fidela, en vetero kruela,  
Mi rapidas al mia anĝelo —  
Por sopire foriri ed al vi nur deziri  
Bonan nokton en lia kastelo . . . »

Ŝi silentas senmove; li komencas denove  
Sian plendon kun petoj ed ploro,  
Ĝis, la brakojn lasinte, la konscion perdinte,  
Ŝi defalis al li al la koro.

En l'arbaĵo silente, aŭskultante atente,  
Staras amb'e gardantoj kovritaj,  
Ili staras genuc, en la manoj senbrue  
La pafiloj ekstremis ŝargĝitaj.



«Estro»! diris kozako, «ia stranga atako  
Al mi ligas subite la manon;  
Brulan sentis mi larmon ed skuantan malvarmon  
Kiam tuŝi mi volis la ĉanon.»

—« Pesto! mi vinjamskuos, mi vin plori instruos!  
Jen saketo kun polvo: sen vorto  
Vi preparos, vi pafos, ed se ŝin vi ne trafos,  
Mi edzigos vin mem kun la morto.

«Supren, dekstren, senskue! Mi ekpafos, —  
l'unue

De-l' amanto diskrevu la koro.»  
La servanto ektiris, ed la kuglo eniris  
En la frunton de . . . lia sinjoro.

Dr. Ludvik Zamenhof.



## 7.

### La rozeto.

(El Goethe.)

---

Knabo vidis — jen rozeto  
Sur la kampo staras;  
Bela, juna la floreto . . .  
Vive kuras la knabeto,  
Ĝojas, miras, flaras.  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

Knabo diris: «mi eltiros  
Belulinon mian»;  
Floro diris: «vi foriros, —  
Per pikiloj mi disŝiros  
Tuj la manon vian».  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante  
La rozeton prenis, --  
La floreto batalante  
Sin defendis pikadante,  
Sed la sorto venis.  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'. Dr. Ludvik Zamenhof.



## 8.

### En nord' unu pino ...

(El Heine)

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵo;  
Glacia ed neĝa tavolo  
L'on kovras per tomba tolaĵo.  
L'o songas, ke palmo gracia,  
En unu dezert' orienta,  
Eterne pri lando alia  
Malgaje sopiras silenta.

Dr. Ludvik Zamenhof.



9.

**En sonĝo...**

(El Heine.)

---

En sonĝo princinon mi vidis  
Kun vangoj malsekaj de ploro, —  
Sub arbo, sub verda ni sidis  
Tenante sin koro ĉe koro.

«De-l' patro de-l' via la krono  
Por mi l'o ne estas havinda!  
For, for lia sceptro ed trono —  
Vin mem mi deziras, aminda!

— «Ne eble!» ŝi al mi rediras:  
«En tombo mi estas tenata,  
Mi nur en la nokto eliras  
Al vi, mia sole amata!»

Dr. Ludvik Zamenhof.



10.

**Lorelej'.**

(El Heine.)

---

Ne scias mi, kial subita  
Malgaj' en la koro naskiĝis;  
El tempo jam enterigita  
Legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l'aero,  
La Rejno mallaŭte babilas,  
Per oro de-l' sun' en vespero  
La supro de-l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
En ora ornamo brilante  
Sur supro de-l' monto ŝi sidas,  
La harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
Ed kantas tra-l' pura aero,  
Ed forto mirinda sin trovas  
En tiu-ĉi kant' de-l' vespero.

Sipet' iras sur la rivero,  
Ŝipisto ekstremis de-l' kanto,  
Ed blinda por ĉiu danĝero  
Rigardas li al la kantanto.

Ha, bald'e ŝipisto la bela  
Perdiĝis sub l'akvoturnado;  
L'on Lorelej' faris kruela,  
Per sia mirinda kantado.

Dr. Ludvik Zamenhof.



## II.

### Kanto de studentoj.

Ĝoju, ĝoju ni, kolegoj,  
Dum ni junaj estas!  
Post plezura estanteco,  
Post malgaja maljuneco —  
Sole tero restas.

Vivo estas tre mallonga,  
Kuras ne tenate,  
Ed subite morto venos  
Ed rapide ĉiun prenos,  
Ĉiun senkompate.

Kie niaj anta'uloj  
En la mondo sidas?  
Iru al la superuloj,  
Serĉu ilin ĉe-l' subuloj —  
Kiu ilin vidas?

Vivu la akademio  
Ed la profesoroj!  
Vivu longe ed en sano  
Ĉiu akademiano,  
Vivu sen doloroj!

Vivu, floru nia regno  
Ed regnestro nia!  
Ed amikoj mecenataj,  
Protegentoj estimataj  
De-l' akademio'

Vivu ĉiuj la knabinoj  
Belaj ed hontemaj!  
Vivu ank'e la virinoj,  
Amikinoj ed mastrinoj,  
Bonaj, laboremaj.

Mortu, mortu, malgajeco,  
Mortu la doloro!  
Mortu ĉiu intriganto  
Ed malamon konservanto  
Longe en la koro!

Dr. Ludvik Zamenhof.



## 12.

### Al la Reĝo.

Vivu la reĝ' al ni, tre longe vivu li!  
Gardu lin Di'!  
Justa ed pia reĝ', — Dio pro nia preĝ'  
Estu kun li.

Forta la reĝa tron', ver' estas lia kron',  
Glavo la leĝ'.  
Kun amo en la kor', reĝas kun granda glor' . . .  
Vivu la reĝ'!

Brulu, ho sankta flam' de la eterna am'  
Pro la patruj'!  
Ed forte staros ni, ĉiuj por unu li,  
Pro la patruj'!

Longe, ho, restu vi gloro de la naci',  
Sur reĝa seĝ'!  
Via plej granda glor' en la popola kor'  
Vivu la reĝ'!

Dr. Ludvik Zamenhof.



### 13.

## Nokta kanto de soldato.

(De W. Hauff.)

En nigra nokto tute sole  
Mi staras gardon senparole;  
Eraras for la penso mia  
Al mia domo familia.

Al la standardo fortirita  
Ho kiom estis mi kisita . . .  
Mi tiam pensis kun malĝojo:  
Mi vidas Vin je-l' lasta fojo!

Ho dormu dolĉe karaj miaj!  
Irante al la litoj Viaj  
Vi nun per preĝo Dion gloras, —  
Vi certe ank'e min memoras.

La horo venis, gard' alia  
Stariĝos nun sur loko mia.  
Mi iras dormi tute laca,  
Mi vidos Vin en sonĝo paca.

Dr. Ludvik Zamenhof.



## 14.

**Kanto de-l' ligo.**

(De W. A. Mozart.)

Fratoj, manon donu kore  
 Ed senzorge, sendolore  
 Belan horon festu ni!  
 Ĉion teran forĵetante  
 Daŭru forte ed konstante  
 Nia bela harmoni'!

Al la Dio kantu gloron:  
 La spiriton ed la koron  
 Kial donis la ĉiel'?  
 Serĉi lumon per vereco,  
 Serĉi virton per justeco  
 Estu nia sankta cel'!

Homoj en la oriento,  
 Homoj en la okcidento,  
 En la sud' ed en la nord'!  
 Alte teni homan nomon,  
 Kore ami ĉiun homon  
 Estu nia liga vort'!

Dr. Ludvik Zamenhof.





15.

**La Kapelo.**

(El L. Uhland.)

---

Supre staras sur la monto  
La silenta kapeleto,  
En la valo, ĉe la fonto,  
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado  
Nun eksonis tra-l' silento, —  
Haltis knabo en kantado  
Ed aŭskultas kun atento.

En la tombojn de-l' monteto  
En la valo ĉiu venos.  
Ank'e vin, ho paŝtisteto,  
Oni iam tien prenos.

Dr. Ludvik Zamenhof.



16.

**La gaja migranto.**

---

Se donas Di' al vi favoron,  
Li sendas vin for el la dom'  
Por montri sian mirlaboron,  
La bela mondon, al la hom'.

De-l' montoj riveretoj fluas,  
Alaŭdoj kantas super mi,  
Mi ank'e gajan kanton bruas  
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo:  
Li zorgas pri la tuta ter',  
Li ank'e min sur mia vojo  
Eterne gardos de danĝer'.

Dr. Ludvik Zamenhof.



17.

## La vojo.

(De barono B. N. Delvig.)

Tre ĉarme l'o lumis, la suno ravanta,  
En mia de vivo mateno;  
En brusto kuraĝo ed forto bolanta,  
Espero ed kredo en pleno . . .

La kamp' estas larĝa ed rekta la vojo . . .

«Anta'en sen halto ed timo!»

La trio ĉevala ekkuris kun ĝojo  
Al celo en la malproksimo.

«Pru! halt'!» «Kio estas?» Risorto rompiĝis.»

«Anta'en! malhelpo ne granda!»

Denove nun la veturil' ekruliĝis,  
Saltante sur vojo rubanda.

Jen marĉo subite! Denove ni haltis . . .  
Tagmezo jam . . . Kia ĉagreno!  
La veturigist' kun murmuro desaltis,  
Mi pelas kun laŭta malbeno.

Tri horojn ni tie sen helpo batalas,  
Ĝis fine ni kun malfacilo  
Elrampas. Subite — la suno jam falas —  
Jen kavo ed nova barilo! . . .

«Returne! kredeble tro dekstren ni iras!»  
Ni rampas . . . Jam nokt' . . . De-l' turmento  
Ni celon forgesis, ni nun nur sopiras  
Ripozon sub ia tegmento . . .

Halt'! Muro! ed mi al la pordo rapidas . . .  
Nur tomboj . . . silenta malĝojo . . . .  
La veturigist' al mi montras ed ridas:  
«Ni venis! Finita la vojo!»

«La Tempo» sin nomas la veturigisto;  
Sur voj' malfacila, facila,  
Li ĉiujn alportas, fidela servisto,  
Al fina ripizo trankvila.

Dr. Ludvik Zamenhof.



18.

## Mortulo.

Kial krias korvo avidulo?  
Kial longe superflugas min?  
Ĉu proksima tie-ĉi mortulo  
Per odoro tiel vokas lin?

Ha, mi legas en signifo kria,  
Vidas kaŭzon en avida trem . . .  
Post la amo malfeliĉa mia  
Estas presk'e mortulo mi mem.

Leo Belmont.



19.

## Nokt' en la koro.

(El Byron.)

Nokt' en la koro . . . la harpo kuŝas . . . .  
Vi tuj ekkantu kantisto!  
Se vi la kordojn de-l' harpo tuŝas,  
Vi miron faras artisto.

Se kor' ancor'e havas esperon,  
Per kanto lo revekiĝos;  
Se la okulo kaŝis larmeron,  
Denove lo eklarmiĝos.

Kant' via tondru mondan doloron!  
La gajon mi ne komprenos . . .  
Vi min plorigu, movu la koron,  
Aŭ mia Brust' ne eltenos.

Lo de suferoj longe manĝiĝis,  
Silentan premis la ĉeno! . . .  
La tempo venis . . . lo jam pleniĝis  
Kjel vazo de la veneno.

Leo Belmont.



20.

### Al brusto, al mia . . .

(El Heine.)

Al brusto, al mia — ha, lo min doloras,  
Almetu maneton, amata knabino!  
Vi aŭdas, ke tie meblisto laboras?  
Li por mi la ĉerkon konstruas sen fino!

Ha, kiel li frapas en mi en la koro!  
La vivo forkuras, ne estas jam por mi . . .  
Rapidu, rapidu kun via laboro,  
Ke povu mi foj' je eterne ekdormi.

Leo Belmont.



21.

### La preĝo.

(El Lermontov.)

Se premas min doloro  
En malfacila hor',  
La preĝon mi en koro  
Ripetas el memor'.

La forto estas ia  
En vorta kunsonec',  
Ed spiras en lo tia  
Sankteco ed dolĉec'.

Senkred' jam ne doloras,  
D'anim' ekfalas for . . .  
Ed oni kredas, ploras,  
Ed faciliĝas kor'.

Leo Belmont.



22.

### L'amo de-l' vivo.

De la naskiĝo ĝis la morto  
La homon ĉie sur la voj'  
De-l' vivo trovas larma sorto,  
Pli da mizero ol da ĝoj';  
Sed anias ĉiu vivon teran  
Por ĝojoj tute senesperan.

Malriĉa pensas pri la pano;  
Por li la vivo — nur sufer',  
Lin akompanas nur malsano,  
Laboro, larmoj, malesper';  
Sed amas li la vivon teran,  
Por ĝojoj tute senesperan.

Insultas unu tutan mondon;  
La dua plendas je-l' edzin';  
Malbenas tria sian rondon,  
Kien la sorto ĵetis lin;  
Sed amas ili vivon teran,  
Por ĝojoj tute senesperan.

Tre ofte en la vivo estas,  
Ke eksriĉuloj de diboĉ'  
Sen pec' da pano fine restas, —  
Sur vivon falas la riproĉ';  
Sed amas ili vivon teran,  
Por ĝojoj tute senesperan.

Instruituloj predikadas  
Pri la dolĉaĵoj de-l' ĉiel',  
Ke vivo nin nur kondukadas  
Al morta, sed feliĉa cel';  
Sed amas ili vivon teran,  
Por ĝojoj tute senesperan.

Pro-l' aĝo ĝemas maljunulo:  
Mortetis sentoj, dormas kor',  
Finita estas la kalkulo  
Kun vivo. Restas nur dolor';  
Sed amas li la vivon teran,  
Por ĝojoj tute senesperan.

Malkontenteco vivas ĉie  
Inter la homoj de la mond';  
Eterne tie-ĉi ed tie  
Verŝadas sin la larma ond'.  
Sed amas homoj vivon teran,  
Por ĝojoj tute senesperan.

P. Sergij Bogoslavskij.



23.

## Printempo.

Printempo venas! Vivon donas  
Al ĉio belulina veno:  
Varmege suno jam proponas  
Radiojn siajn, ed mateno  
Vizaĝon belan kun rideto  
Al ĉiuj montras; jam de-l' montoj  
Kun bruo fluas rivereto  
Ed detruataj estas pontoj.

Denove ĉio reviviĝas,  
Kantadas venon de printempo . . .  
Por mi nur daŭras, ne finiĝas  
Malbona, malvarmega tempo!  
Por mi ne estas suna lumo,  
Ed de printempo bela veno  
Nenion donas . . . Nur mallumo,  
Mallumo sola ed . . , ĉagreno!

Vasilij Devjatnin.





24.

## Ŝipeto.

---

Malgranda ŝipeto  
Kun blanka veleto  
Naĝadas trankvile sur maro . . .  
Sed venis ventego,  
Fariĝis ondego —  
Pereas ŝipet' sub akvaro!  
Ed homo mizera  
Kun kredo sincera  
Vivadas trankvile en mondo;  
Sed kredo forblovis,  
Ondeĝo sin movis,  
Ed homo pereas sub ondo.

Vasilij Devjatnin.



25.

## Sciuro ed papago.

---

Sciuro malgranda kuradis en rado  
Ed homojn amuzis per sia kurado.  
Ed jen al papago lo diris fiere:  
«Mi vin, mizerulo, bedaŭras sincere:  
Kun kora doloro eterne mi vidas,  
Ke tute senmove sur ringo vi sidas! . .  
Rigardu: jen ĉiam mi kuras pli alte  
Ed tial je vivo kontentas senhalte . . .»

Papago rigardis sciuron kun moko,  
Ed diris: «kurado rapida ed lerta,  
Sed bone kurante, sur unu nur loko  
Vi restas mizera besteto nesperta.

Vasilij Devjatnin.



26.

## Maristoj.

(El Jazykov.)

Tre dezerta estas maro,  
Tage, nokte bruas lo,  
Ed profunde sub akvaro  
Kuŝas morto nur, en lo.

Fratoj, estu vi sen timo:  
Nin sub vent' starigis mi,  
Flugos super mar' sen limo  
Kiel bird' ŝipet' kun ni.

Kuŝas super mar' nubego,  
Ondoj-nigraj, vento-fort':  
Estos bald'e jam ventego,  
Sed batalos ni kun sort'!

Fratoj! venas jam ventego,  
Bruas tuta mara fort',  
Estos alta pli ondego,  
Ed al ni minacas mort'!

Tie, post malbon-vetero  
Bona tero vokas nin,  
Ed en tiu bona tero  
Jam feliĉ' atendas nin.

Fratoj, mi rektigis velon,  
Estu tute vi sen tim'  
Bald'e ni atingos celon, —  
Ŝparu forton en anim'.

Vasilij Devjatnin.



27.

## Angelo.

(El Lermontov.)

En mezo de nokto, en blua ĉielo,  
Traflugis ed kantis plej bela anĝelo.  
Ed nuboj ed steloj ed lun' en irado  
Atentis kun ĝojo jel' sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn  
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;  
Li kantis pri Patro ĉiela ed tera —  
Ed lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;  
En mondo malgaja naskiĝi lo venis.  
Ed sono de-l' kanto en juna animo  
Restadis sen vort', sed kun viva estimo.

Tre longe en mondo lo estis premata,  
Je revo mirinda pri Di' plenigata!  
Ed ŝanĝi la kanton de-l' sankta sincero  
Ne povis por lo ĉiuj kantoj de-l' tero.

Vasilij Devjatnin.



28.

## Husaro.

(El Puŝkin.)

Ĉevalon sian li purigis,  
Estante forte kolerega,  
Ed diris: «min diabl' devigis  
En loko loĝi malbonega!

Ni ĉiam tie-ĉi restadas  
En turka kvaz'e batalado:  
Nur solan supon ni manĝadas  
Ed eĉ ne pensas pri drinkado.

Ed mastro tie-ĉi malbona,  
Malbonan havas li edzinon . . . .  
Nek via skurg', nek vorto bona  
Admonas tie-ĉi virinon!

Jen urbo Kiev! Lando kia,  
En buŝon falas mem buletoj,  
Ed vinon havas domo ĉia,  
Ed kiaj tie virinetoj! . . .

Ne estas eĉ domaĝ', je Dio,  
Sin mem pro ili pereigi!  
Malbone estas nur per tio . . .  
— Per kio? volu min sciigi! —

Ed li komencis plibonigi  
Lipharon. «Eble ne timulo,  
Li diris, estas vi, sed igi  
Vin miri povas mi — spertulo.

Aŭskultu: regimento nia  
Ĉe Dnepro larĝa enlokiĝis.  
Mastrino estis bona mia,  
Ed tombon ŝia edz' foriĝis.

Kun ŝi mi bald'e amikiĝis;  
Ni vivis pace, tute bone.  
Al mi Maria humiliĝis,  
Ne diris vorton eĉ malbone.

Se mi malsobra estis tute,  
Ŝi mem min zorge kuŝigadis;  
Ŝi ĉiam tute sendispute  
Je ĉio tuj mem konsentadis.

Feliĉan vivon mi pasigis,  
Ed longe tiel vivus, eble, —  
Sed jen subite ĵaluzigis  
Min io, — mem diabl' kredeble.

Mi pensis: kial baptanino  
Sin levas nokte? kion volas?  
Tre juna estas ŝi virino,  
Ed tial eble ŝi petolas! . . .

Mi observadi ŝin intencis.

Jen foj' ne dormis mi (en korto,  
Jam estis nokto, ed komencis  
Bruegi vent' kun granda forto).

Ed vidas mi: ŝi forrapetis,  
De forno prenis ŝi karbeton,  
Min tre facile pripalpetis,  
Disblovis apud forn' fajreton ;

Ŝi ekbruligis kandleton,  
Kun lo angulon ŝi foriĝis,  
De tie prenis boteleton,  
Sur balailon ŝi sidiĝis ;

Ŝi senvestiĝis, ed sorbinte  
El boteleto, ŝi tra tubo,  
Sur balailo sidiĝinte,  
Tuj malaperis, kvaz'e nubo.

— Ŝi eble estas sorĉistino, —  
Mi pensis, ed de forn' rapidas,  
Por vidi sorĉon de virino ;  
Ed jen mi boteleton vidas,

Mi flaris: ia acidajo . . . .  
Mi plankon ŝprucis el botelo:  
Forflugis — kia mirindaĵo! —  
Ed forna forko ed sitelo!

Sub benko katon mi ekvidis,  
Sur lon mi ŝprucis el botelo:  
Lo ternis tuj ed ekrapidis  
Subite fornon post sitelo.

Sur ĉion ŝprucis sen kompato  
Jam mi per tuta forto mia, —  
Ed ĉio: tablo, benko, pato  
Forflugis unu post alia.

Al ili mi ne volis cedi  
Ed trinkis mem per unu fojo  
Restaĵon . . . Ĉu vi povas kredi?  
Mi ekaperis tuj en vojo:

Mi flugas, — kien? mem ne scias,  
Kun forto tranĉas nur aeron,  
Al steloj mi: «pli dekstre» krias. . . .  
Ed jen ekfalas mi sur teron.

Jen mont'. Sur lo kaldronoj bolas,  
Ed oni faras ian ludon.  
Kantadas, fajfas ed petolas,  
Kun granda ran' edzigas judon.

Mi kraĉis . . . . Flugas jen Maria :  
«For! hejmen kuru petolulo!  
Vin oni tuj formangos! . . .» — Kio?!  
Nu, mi ne estas timemulo!

Min ne timigu! Kie vojo  
Al hejmo estas? — «Jen sidiĝu  
Sur fornan feron, — kun malĝojo  
Respondas ŝi, — ed tuj foriĝu!»

Vi volas, ke husar' sidiĝu  
Sur fornan feron?! Baptanino,  
Mi petas vin, ne frenezigu,  
Ne estu tut' malsaĝulino! . . .

Ĉevalon! . . «Prenu, malsaĝulo!»  
Ŝi efektive diris veron:  
Jen anta' mi ĉeval'-bravulo  
Per hufo forte batas teron.

Sidiĝas mi kun brava vido  
Sur lon' ed trovi bridon penas,  
Sed vane! Rajdas mi sen brido —  
Ed tuj al forno ni alvenas.

Ed jen mi tion saman vidas . . .  
Ĉevalo tute jam forestis,  
Ed mi sur benko rajde sidas . . .  
Jen kia strang'-okazo estis!»



Ed li daŭrigis plibonigi  
Lipharon. «Eble ne timulo,  
Li diris, estas vi, sed igi  
Vin miri povas mi-spertulo.»

Vasilij Devjatnin.



29.

## Infano de Zorgo.

(El Herder.)

Finiĝis varmega jam tago,  
Ed nokto agrabla fariĝis.  
Sub ombra cipreso, ĉe lago  
Diino de Zorgo sidiĝis.

El ruĝa argilo Diino  
Malgaje figuron skulptadis, —  
Ed luno, de nokto reĝino,  
De blua ĉiel' rigardadis.

Ed Zeŭso al bela Diino  
Parolis kun dia favoro:  
«Rakontu, malgaja knabino,  
Pri via doloro en koro?»

«Ho, Zeŭso!» Diino rediras:  
«Alportu vi al mi plezuron!  
Nur solan sen fin' mi deziras:  
Vivigu vi mian figuron!»

— Volonte mi vin kontentigos:  
Viviĝas figuro jam via! . . .  
Sed tamen de nun mi devigos,  
Ke estu eterne li mia. —

«Ho, ne!» al li Zorgo parolas:  
Figuron mi longe skulptadis,  
Al vi mi lin cedi ne volas,  
Ĉar lin mi por si preparadis!

Por mi lin restigu! Korege,  
Sed vane ŝi Zeŭson admonis.  
— Ho ne! mi lin amas varmege,  
Al li ĉar animon mi donis! —

«Por kio disputon vi tenas?»  
Subit' al li Tero rediras:  
«Al mi li sen dub' apartenas,  
Ĉar tera en teron foriras!»

Ed dioj disputis senfine,  
Ĉar cedi neniŭ deziris  
Figuron argilan, — sed fine  
Al Kron' ili ĉiuj ekiris.

«Ĉar un' al alia ne volas  
Figuron vi tiun-ĉi cedi,»  
Grizhara Saturn' ekparolas:  
«Vi kune lin povas posedi.

Aŭskultu — do, dioj: nur kiam  
Li mortos, anim' apartenos  
Al Zeŭso potenca, — ed tiam  
Jam Ter' lian korpon alprenos.

Ed vi, ho, de Zorgo Diino,  
Posedu lin ĝis lia morto! . . . .  
Mi pensas, ke tia difino  
Simila je hom' estas sorto?

Vasilij Devjatnin.



30.

**E s p e r o.**

(El Schiller.)

Tre multe homar' kun espero en koro  
Pri vivo estonta parolas,  
Ed ĉiam al celo feliĉa ed ora  
Aliri plej balde lo volas.  
Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras, —  
Sed homo esperon senĉese adoras.

Espero kun li sen-aparte vivadas;  
Lo knabon dorlotas, junulon  
Per sorĉa radio lo gaje logadas,  
Konsolas ĉe tomb' maljunulon:  
Li tre lacigita per vojo de tero,  
Foriras en tombon kun dolĉa espero.

Ho, ne! lo ne estas elpenso malvera  
Per revoj malsaĝaj naskita!  
Ni scias, ni sentas kun kredo sincera,  
Ke estos esper' plenumita.  
Ed tiu-ĉi sento ĉu estas kapabla  
Nin trompi en nia revaĵo agrabla?

Vasilij Devjatnin.



### 31.

## Garantio.

(El Schiller.)

Damon' unu fojon mallaŭte trairis  
Kun akra tranĉilo sub bask' al tirano —  
Al Dionizio, — sed unu gardano  
Lin kaptis subite. Tiran' al li diris:  
«Pro kio vi al mi, fripono, aliris?»  
— Mi sanktan promeson ekvolis plenumi . . . —  
«Krimulo! mi tuj vin ordonos krucumi!»

— Jam longe al morto mi estas pretita,  
Ed, kredu, ne diros mi eĉ unu vorton  
Pro mia pardono, ĉar havas mi forton,  
Por morti sur kruco; sed se inklinita  
Vi estas al bono, — ho, estu donita  
Al mi kelka tempo, por fraton edzigi, —  
Ĉe vi-do, mi povas amikon restigi. —

Kruele ekbrulis tirana rigardo,  
Ed diris li post la silento momenta:  
«Tre bone, kun tio mi estas konsenta;  
Sed tamen memoru vi tion, bastardo,  
Ke vian amikon mi tenos sub gardo  
Ne pli, ol tri tagoj, — ed poste li mortos,  
Al vi li per tio pardonon alportos.»

Al sia amiko Damono alvenis  
Ed diras: «tiran' min aljuĝis krucumi,  
Ĉar volis mi sanktan promeson plenumi . . .  
Ed mi nur tri tagojn ricevi elpenis  
Por fraton edzigi . . .» ed li ĉirka'prenis  
Amikon ed petas: ho, restu, karulo,  
Vi por garantio ĉe malbonegulo!»

Amiko volonte konsentis ed restis  
En malliberejo li por garantio,  
Ed tuj liberigis Damonon per tio . . .  
Damono edziĝon de frato forfestis,  
En tria mateno tre frue sin vestis  
Ed vojon rapidas, malfrui timante  
Ed ĉiam pri sia amiko pensante . . .

Subite tre forta ventego fariĝis,  
Ed tondro, ed fulmo ed granda pluvego;  
Pli forte, pli brue koleras ventego, —  
Ed jen riveretoj de mont' ekruliĝis,

Riveron plenigis, ed lo ekondiĝis . . .  
Damono al ponto rapidas de monto,  
Ed vidas, ke estas rompita jam ponto.

Li vagas sub pluvo sur bord' de rivero,  
Ed tre malproksime li vidas dometon;  
Li krias, li vokas, li petas ŝipeton:  
Tut' vane, — neniu ĉar kun malespero  
Ekvolis batali kun brua rivero . . .  
Ed bald'e rivero jam aliformiĝis:  
Lo tute je maro simila fariĝis.

Ed jen lian koron plenigis doloro,  
Li ploras, anta'en li manojn etendas,  
Ed preĝon varmegan al Zeŭso li sendas:  
«Kompatu!» li petas kun granda fervoro —  
Ed min ekrigardu kun dia favoro!  
Se al Sirakuzoj vi min ne alportos,  
Ho! . . mia amiko senkulpe ja mortos!»

Sed vane kompaton de Zeŭso li petas:  
Ventego ed ondoj ed pluv' ne ĉesiĝas,  
Sed ĉiam pli fortaj, teruraj fariĝas, —  
Ed tempo forpasas . . . Damono formetas  
De si sian veston, kuraĝe sin ĵetas  
En bruan riveron ed naĝas, tranĉante  
Per brusto nur ondon, kun mort' batalante.

Ed jen li sur bordo jen estas, — elŝiris  
Sin tute el brakoj teruraj de morto,  
Ed multe dankem' al favoro de sorto,  
Rapidas li plu . . . Sed subite eliris  
El granda arbaro rabistoj. Aliris  
Al ili Damono, — ed ili malpace  
Ĉirka'is lin tute, rigardas minace.

«Ho, kion vi volas, krimuloj?! li diris:  
Ankor'e ne scias, friponoj, vi tion,  
Ke mi, nur krom vivo, jam havas nenion!  
Sed vivo — ne mia!» Ed tuj li aliris  
Al ili, bastonon de unu elŝiris,  
Per lo li eksvingis, ed tri li mortigis,  
Aliajn-do ĉiujn facile forigis.

Sed suno post pluvo varmege bruligis  
Migranton, ed tute li perdis jam forton;  
Kun granda teruro atendis li morton, —  
Ed preĝis li Zeŭson: vi min liberigis  
El ondoj bruegaj, de mi vi forigis  
Rabistojn, — ĉu tie-ĉi devas suferi  
Mi vane, ed morti, amikon oferi?! . . . .»

Ed — kio do? — kvaz'e subit' murmuretas  
Ne tre malproksime malgranda rivero!  
Rapide sin turnas al lo kun espero  
Damono — ed vidas, ke fonto fluetas.

Al lo superforte li tuj alvagetas,  
Soifon brulegan kun ĝoj' kvietigas  
Ed korpon malsanan en lo li freŝigas.

Jam suno varmega majeste subiras  
Ed ombroj tre longaj kuŝiĝas sur tero:  
Tre bald'e jam venos trankvila vespero.  
Sur vojo al urb' du migrantoj jen iras,  
Damonodo ilin en voj' preteriras.  
Migrantoj parolas, Damono aŭskultas,  
Ed aŭdas: «lin oni jam nun ekzekutas!»

Tumulto piedojn al li flugiligas,  
En lia animo — senfinaj teruroj . . . .  
Ed jen Sirakuzoj! Nur suprojn de turoj  
Malalta jam suno facile origas:  
Jam estas vespero! . . Ed li rapidigas  
Ankor'e pli paŝojn, — ed vidas — en strato  
Renkontas lin lia servant' Filostrato.

— Revenu, ĉar ĉio jam estas finita! —  
Li diris malgaje: en urbon ne iru,  
Mi petas vin, el Sirakuzoj foriru!  
Li estas jam al ekzekuto metita.  
Li kredis sen fin', ke li estos trompita.  
Neniam de sia amik', ed nenio  
Lin povis devigi ne kredi je tio. —

«Ho, se jam malfrui al mi estas sorto,  
Ed se mi ne povas de mort' liberigi



Amikon, — mi devas min ank'e mortigi:  
Tirano ne diru, ke kuris de morto  
Mi nur dank' al mia anima malforto!  
Al vi mian vivon volonte mi cedas,  
Sed sciu, ke homoj ed amas ed kredas!»

Vespere Damon' Sirakuzojn eniras  
Ed vidas, ke kruco sur placo jam staras,  
Ed oni jam tute amikon preparas,  
Por lin ekzekuti . . . Kun forto traŝiras  
Amason popolan Damono ed diras:  
«Mi morton deziris de Dionizio, —  
Mi estas krimulo, li — nur garantio!

En granda mirego popol' silentiĝis . . . .  
En ĝojo amikoj sin tuj ĉirka'prenas  
Ed ploras, — pri kio — neniu komprenas,  
Sed larmoj el ĉiuj okuloj ruliĝis . . . .  
Minaca tirano pri ĉio sciiĝis;  
Li je amikeco ilia tre miras  
Ed verajn amikojn li vidi deziras.

Ed jen ili venas. Kun vido afabla  
Tirano renkontas amikojn ed diras:  
«Vi venkis min tute, je vi mi tre miras!  
Mi estas ancor'e por amo kapabla,  
Ed se mi ne estas al vi malagrabla,  
Permesu al mi, ke en ligo mi via,  
Amikoj varmegaj, por vi estu tria! . . .

Vasilij Devjatnin.



## 32.

## Al laboristo.

(El Voss.)

Ho, frato! dum vi laboradi  
 Ankor'e povas sen ripozo,  
 Ne volu manon eltiradi  
 Al bonaj homoj pro almozo.

Sed kiam de kruela sorto,  
 Ho, mia mizerega frato,  
 Foriĝos tuta via forto —  
 Vi sin mortigu per malsato!

Vasilij Devjatnin.



## 33.

## Ĉu mi vivis?

(El Nadson.)

Ĉu vivis mi? Jen la respondo:  
 Mi dormis . . . ĉiuj ank' dormadis . . .  
 Ĉar kion faris ni por mondo,  
 Kian ideon ni celadis?

«Anta'en»?! vana trompa vorto!  
 Ni iru la pasintajn aĝojn!  
 Tie de-l' duboj sorĉa forto  
 Ne turmentadis homajn saĝojn.

Tie predikon Petro diris  
Pri Krista tombo, Dia amo;  
Tie Tell' en batalon iris,  
Tie sin ludis Hus'a dramo . . . .

Tie ne estis sentaŭgulaj  
Malĝojoj, sed brulis flameco,  
Ed mem el faroj malbonulaj  
Tie elbrilas majesteco.

Sed ni? Ho kiel nesimila  
Al fera antikveco tia,  
Nun estas formikejo nia:  
Pigmea, besta, senutila.

P. Aleksander Dombrowski.



### 34.

## Amiko, frato mia...

(El Nadson')

Amiko, frato mia, laca, doloranta, —  
Fortigu la animon per sankta espero!  
Ne rigardu, ke nune malbono reganta  
Estas sur la lavita de la larmoj tero!

Ne rigardu, ke oni rompas idealon,  
Ke la sango fluadas senkulpa tioma!  
Kredu, estonta tempo detruos Baalon,  
Ed ree venos amo al la gento homa.

Ho, jam ne pezan krucon, ne ĉenojn portanta,  
Ne kun koro vundita de fero lo venos;  
Sed montros sin per forto ed gloro brilanta,  
Ed torĉon de-l' feliĉo en la mano tenos.

Ed ne estos sur tero plu malamikemoj,  
Nek da malliberuloj malfeliĉaj miloj;  
Nek la tomboj senkrucaj, malsatulaj ĝemoj,  
Nek glavoj, nek la ŝnuroj, nek la pendigiloj.

Ed tiu-ĉi alveno, kredu, kara frato,  
Ne estas anta'sento aŭ revo vanega;  
Ĉar mondo de-l' malbono estas tro premata,  
Ĉar nokto ĉirka'igis nin tro mallumega.

Jes, fine la homaro, je-l' turmentoj sata,  
Ĉesos trinki la sangon, forĵetos batalojn,  
Ed levos la okulojn je-l' Amo benata  
Ed komencos soifi sanktajn idealojn.

Ed la popoloj diros unu al alia:  
Ni estu la amikaj eroj de-l' homaro,  
Ed la frateca himno de la preĝo nia  
Eksonuru en unu jam ĉiupiaro!

P. Aleksander Dombrowski.



**Mia mizero.**

(Litva popola kanto.)

Mia mizero, mia mizero!  
 Ĉu mi vin finos iam suferi?  
 Kiam mi iris je-l' granda vojo,  
 Mia mizero min akompanis.  
 Sed jen alrajdas cento da fratoj,  
 Kvar cent piedoj estas ĉevalaj.  
 Fratoj! Vi batu mian mizeron  
 Per la piedoj de la ĉevaloj,  
 Ed per brilantaj viaj glavetoj.  
 La junaj fratoj longe lon batis,  
 Sed la mizero nenion timas,  
 Mia mizero nenion timas,  
 Kreskas, vastiĝas ed pligrandiĝas.  
 Mia mizero nenion timas,  
 Elmetas verdajn foliojn, branĉojn.  
 Mia mizero tiam finiĝos,  
 Kiam mi venos al la patrino.  
 Mia patrino loĝas monteton,  
 Altan monteton, novan ĉerketon.

P. Aleksander Dombrowski.



### 36.

## La malliberulo.

(Litva popola kanto.)

Ho en la verda, verda arbaro  
Estas malluma malliberejo.  
Ed en tiu-ĉi malliberejo  
Oni enŝlosis junan frateton.  
Tie li povas neniam scii  
Ĉu venis vintro aŭ la printempo,  
Neniam vidi la brilan sunon  
Nek leviĝantan, nek subirantan.  
Mi metus oran ringon je-l' muro,  
Eble mi farus tie fenestron,  
Eble mi farus tie fenestron,  
Por ke la frato ekvidu sunon.  
Mi metus pecon da blanka neĝo,  
Por ke li sciu la frostan vintron;  
Mi metus freŝajn florojn je-l' muro  
Por lin sciigi pri la somero.

P. Aleksander Dombrowski.



### 37.

## La turo babilona.

Kial vi, patroj, en Babilono  
Konstrui turon komencis,  
Ed tre fiere ank'e je-l' trono  
Ĉiela regi intencis?

Ĉu jam senfina, vasta, la tero  
Al Vi ne estis sufiĉe?  
Vi ja trankvile ed sen danĝero  
Ĉirka'e vivis feliĉe.

Kien sin turnis Viaj okuloj,  
Havante lingvon komunan,  
Trovis loĝejon Vi, anta'uloj,  
Bonegan ed oportunan!

Jen al Vi plaĉis monto, jen valo,  
Trankvila en Sinorujo, —  
Ĉie potenco Via egala  
Ed ĉie Via patrujo.

Kial deziris Vi do subite  
De-l' val' suriri ĉielon?  
Vi per argilo, brikoj malsprite  
Atingi pensis la celon?

Sed entrepreno Via, ho, vana,  
Senfrukta restis je-l' fino;  
Tuj l'on detruis Dia la mano,  
Kondukis Vin al ruino.

Dum la konstruon Vi diligente  
Plialten levi rapidis,  
Jen Vian lingvon Dio momente  
Je lingvoj mil disdividis!

Nun jam pri kio unu parolas,  
Komprenas dua nenion,  
Ed ne sciante, kion li volas,  
Al li venigas alion:

Unu por l'alta granda konstruo  
Necese brikon bezonas, —  
Ne komprenante lin, jen la dua  
Argilon tuj al li donas.

Tuj malkonsento, poste batalo  
Fariĝis inter la rondo;  
Tuta l'homaro iris de-l' valo  
Diversajn landojn de-l' mondo.

Kvank'e jam pasis miloj da jaroj  
De tiu puno de Dio,  
Regas ankora' inter homaroj  
Malamo, senharmonio.

Vere la patroj kontra' la Dio  
Multege tiam fieris;  
Kial ĝis nun por peko ilia  
Senkulpaj idoj suferis?

Sed ni esperas bald'an refondon  
De-l' lingvo ĉiunacia,  
Kiel konsolis tutan la mondon  
Jam la profet' Zefania.



Ĝoje l'espero nin jam karesas,  
Proksiman celon montrante;  
L'internacia lingvo progesas  
Amikojn ĉie trovante.

Novajn amikojn voku, amikoj,  
La voko vana ne estos!  
Floras jam flor', ne sole radikoj,  
Je-l' frukto bald'e ni festos.

Mozes Goldberg.



38.

## N o v a d i o .

(De S. Frug.)

I.

Jam plena estas la festeno  
De bril', sonoro, bru', soleno  
En la palac' de faraono;  
En vic' pentrinda anta' vastaj  
Trapezaj tabloj sidas gastoj  
Konvene, en mez de salono.

De-l' tron' antikva la apogoj —  
La saĝeguloj, astrologoj,  
En silk' brodita investitaj —  
La militestroj, generaloj  
Armitaj kun hakiloj ŝtalaj,  
Per ringoj oraj ornamitaj.

Sin de kolono ĝis kolono  
Etendas kiel tend' visono  
Tre multekosta, multkolora ;  
Ed de fumilo origita  
Ĉirka'e estas disverŝita  
La timiano bonodora.

Al flut', liutoj, barbitonoj  
Per rapidegaj belegsonoj  
Bruega la tintil' ripetas ;  
Ed peza la amfor' konsolas  
Rigardon, koron vekas, bolas  
Ed muĝas, ed fajrerojn ĵetas.

Atentas faraon' sonoron  
De-l' himnoj ed gracion ĥoron.  
Senlima l'ordonanto estas  
Je la rigardo luma, klara ;  
Lo estas fest' neordinara :  
Nomtagon sian li nun festas.

De subpotencaj al li princoj  
Donacojn oni el provincoj  
Al li alportas multekostajn —  
Smeraldojn, perlojn ed armaĵojn,  
Tapiŝojn, vazojn ed teksaĵojn,  
Argenton, elfantajn ostojn.

La gastoj riĉajn la donacojn,  
Envenigitajn la palacojn,  
Rigardas kun mireg' ed ravo . . .  
Tuj, defleksinte pordkovrilon,  
Tremante, en salonon brilan  
Eniris brunvizaĝa sklavo:

«Aŭskultu reĝ', — la sklavo diris —  
Mirindaj viroj du aliris  
Al la pordegoj de la korto . . .  
Traflugis preter la gardantoj  
De la kortego, maldormantaj,  
Tuj nevidate ed sen vorto.

Vidante l'mirajn du personojn  
Surflugis du ibis' . . . Leonojn  
De-l' ĉen' mi lasis — sen kuraĝo,  
Per la kolharoj balainte  
La polvon, kapon mallevinte,  
La reĝoj super best' sovaĝa

Timeme iris, proksimiĝis  
Al ili paŝ' post paŝ', stariĝis  
De-l' flankoj sur la piedegoj;  
Netera kvaz'e ar' gardanta  
Al ili vojon malkovranta  
Al reĝaj tiuj-ĉi pordegoj

Sonor', paroloj eksilentas,  
La gastoj virojn du atendas . . .  
«Sed, — krias laŭte l'ordonanto, —  
De kie venas tiuj viroj?  
Ĉu portas ili krom' la miroj  
Donacon indan por reganto?»

— Reganto granda, — l'sklavo diras, —  
Per forto de la dioj spiras  
Iliaj la vizaĝoj brilaj . . .  
Gardantoj estas enbrakataj  
Per tim' . . . Jen!» en salonon fratoj  
Eniris du de Amram filoj.

La gastoj vidas anta'-l' trono  
Jen staras Mozes, Aarono  
Sur la tapiŝ' purpura, riĉa —  
En simplaj ed malriĉaj vestoj;  
Severaj je-l' elvid', majestaj  
Kun bastoneg' en man' malriĉa.

## II.

Reĝ' rigardante tre severe  
Je-l' nevokitaj gastoj, fjere  
Demandis: «Kiu vi? je-l' festo  
Nomtaga, reĝa, l'ordonita,  
Kial do venis vi vestitaj  
En tia malriĉega vesto?»

Al vi malbona fort', magio  
Malfermis pordon . . . Sed do kio!  
Mi kun kontent' en la palacon  
Akceptas ĉiam gastojn tiajn;  
Se indos sorĉ' atenton nian,  
Ricevos riĉan vi donacon.

La kapon alten eklevinte,  
Al Di' humile kliniĝinte,  
Al reĝ' respondis Aarono:  
Sorĉistoj estas ni neniam,  
Kun fort' malluma, kun magia . . .  
Aŭskultu vi do, faraono!

Ni ne el reĝa familio:  
Ni estas filoj de nacio,  
Per kies manoj humilegaj  
Fariĝis luksaj viaj landoj,  
En vic' majesta l'turoj grandaj  
Ed fortikaĵoj ed kortegoj.

Per kies diligent' ed peno  
Ekfloris tiu kamp', ĝardeno,  
Nun de dolĉaĵo plenigita . . .  
Sed jam sufiĉe lo suferas!  
Centjara la labor' esperas  
Jam esti tuj rekompencita!

La Di' de-l' dioj ed Reganto,  
La sola Di', ne ŝanĝiganta,  
Alsendis nin al via trono.  
Lia Spirit' en ni sin trovas:  
Lo niajn lipojn, buŝon movas . . .  
Atentu tjal Lin faraono:

«Jehov' . . .» — «Jehov' mi lin ne scias,» —  
Al Aarono laŭte krias  
Fiera faraon' kun rido: —  
Al mi di' de Moav', Edomo —  
Konataj estas, ed la nomo . . .  
Jehovo — kiu estas li do?

El malproksima lando, limo  
Popoloj ĉiuj por estimo,  
Elsendis ja al mi senditojn,  
Saĝulojn ed arĥitektistojn,  
Ed astrologojn ed maristojn,  
Ed pastrojn ed sankt-oleitojn.

Kun laŭda kant' palacon mian,  
Kiel preĝejon sanktan, dian,  
Eniris ĉiu humilege,  
Al faraon' donacon sian,  
Kiel oferon bruston dian,  
Sur sojl' kuŝigis respektege.

Kiel malriĉa devas esti  
Di' via nova, se, krom vesti  
Vin pastrovestojn disŝiritajn,  
Ne povis li de malpotenco  
Jam per alia rekompenco  
Vin rekompenci elektitajn.

La di' de-l' sklavoj malfeliĉaj,  
Ŝtonistoj tiuj-ĉi malriĉaj,  
La sovaĝuloj ed sen scioj,  
De la nudaj', mallumo blinda,  
Ho, kiu estas di' ridinda,  
La reĝ' de-l' reĝoj, di' de-l' dioj?

Kjel de enfal' en mont' tondrego,  
Ektondris anta' tabl' ridego;  
Ed la komuna rida krio  
Ruliĝis eĥe, laŭte bruis  
De malproksim', palacon skuis:  
Kiu li estas nova dio?

Kiu li estas? . . . Tagoj venis, —  
Ed tuj ekkonis, ekkomprenis  
La Dion Novan Egiptanoj;  
Sed per turmentoj, malagrabloj  
De-l' dezertej' en brulaj sabloj,  
En profundaj' de-l' oceano.

Jam pri la Granda Dio Nova,  
Regant' de-l' mondo, Ĉiopova,  
De-l' Nil' la sojloj, kantis, bruis;  
Ed kun tondrego ed ventegoj  
Inter granitaj la ŝtonegoj  
De-l' maro ond' kantante fluis . . .

Ed ripetante al la kanto  
Je-l' mar' senfunda ed bruanta  
Kun sankta mirsciig' konsola  
Per triumfega kri: «Libero!»  
Eksonis laŭte sur la tero  
Renaskiĝanta la popolo . . .

Mozes Goldberg.



39.

## La Nimfo.

(El Puŝkin.)

Jam apud laĝet' en senvivaj arbaroj  
Monaĥo pasigis multegon da jaroj.  
Malgaje la vivo al li forkuradis:  
Li ĉiam fastadis ed ĉiam preĝadis.  
Jam tombon preparis al si per fosilo  
Monaĥ' la maljuna en pia humilo.  
Pri morto trankvila, al Dio plaĉanta,  
Konsistis nun lia petego konstanta.



Jen foj' en somera vesper' harmonia  
Preĝadis al Dio monaĥo la pia;  
L'arbaro senviva pli nigra fariĝis  
Ed super la lago nebulo fumiĝis;  
En nuboj jam sur la arkaĵo ĉiela  
Mallaŭte ruladis sin luno la bela,  
Ed sur la supraĵon de-l' lag' en kvieto  
Rigardas maljuna la anaĥoreto.

Li vidas — subite terur' al li venas,  
Li de konfuziĝo sin mem ne komprenas ...  
Li vidas — la akvo de-l' lag' ekondiĝas  
Ed bald'e denove lo rekvietiĝas.  
Ed kiel ombreto de nokto facila  
Tre blanka, al neĝo de-l' monto simila.  
Jen nuda virino el laga la pordo  
Eliras, sidiĝas sen vort' sur la bordo.

Ŝi la maljunulon rigardas senpekan,  
Ed kombas al si la haraĵon malsekan.  
La sankta monaĥo ekstremis entime,  
Vidinte l'belecon virinan proksime.  
Knabin' la mirinda per man' lin logadas,  
La kapon ridete al li balancadas . . .  
Ed kiel falanta brilega steleto,  
Ŝi ekmalaperis en ond' de lageto.

L'ermito malgaja en nokt' ne dormetis  
Ed tutan la tagon li Dion ne petis.

Per penso eraras li al la lago . . .  
Jen anta' li l'ombro de la virineto . . .  
Denove l'arbaro tuj remallumiĝas  
Ed super la nuboj la luno ruliĝas . . .  
Ed super la akvo li ree ekvidas  
L'amindan knabinon, tre pala ŝi sidas . . .

Li vidas, al li ŝi la kapon balancas,  
Ed de malproksime ŝi kisas ed dancas,  
Ed plaŭdas la akvon per ĉarma la mano,  
Ed ploras ed ridas ŝi, kiel infano,  
Alvokas l'ermiton al sia lago:  
«Al mi, ho rapidu, Vi, anaĥoreto!» —  
En ond' travidebla ŝi bald'e kaŝiĝis,  
Ed tuj trankvileco profunda fariĝis.

Sur bordo de-l' lago en tago la tria  
Jen sidas monaĥo, malgaja, pasia,  
Al sia plej kara rigardojn li sendas,  
Dum super l'arbaro sin ombro etendas . . .  
Forpelis mallumon radio la suna —  
Nenie sin trovas l'ermito maljuna . . .  
Popolo rakontas, ke lia grizaĵo  
Nun estas vidata en la profundaĵo.

Mozes Goldberg.



**La festeno.**

(El Puŝkin.)

Amas mi ĝojon de nokta festeno,  
 Kie la vorto «Trink'» ĝis la mateno  
 Supersonegas la krion de-l' kanto;  
 Kie idolo ed leĝodonanto  
 Anta' la tablo, de mi libereco,  
 Ed prezidanto, nur mia gajeco.  
 Kie tre vasta la rondo de-l' gastoj,  
 Ed de-l' boteloj rondetoj-malvastaj!

Mozes Goldberg.

**Stancoj.**

(El Puŝkin.)

Multhoman preĝejon se iam mi venas,  
 Aŭ inter junuloj sensencaj troviĝas,  
 Aŭ mi sur la strato bruanta promenias,  
 Al miaj revadoj mi aldonatiĝas.

Rapide forkuras la jaroj — mi diras:  
 El ni je eterne neniu ja restas;  
 L'arkaĵojn eternajn do ĉiu subiras  
 Ed ies la horo proksima jam estas.

Se kverkojn ekvidas mi en la arbaroj,  
Ekpensas mi: jen Vi transvivos, granduloj,  
Ank' aĝon la mian, patrjarĥoj centjaraj,  
Tjel, kiel la aĝon de la anta'uloj.

Se mi infaneton amindan karesas,  
Mi pensas jam: lasta hor' mia eksonos,  
Adi', infaneto! bald' vivi mi ĉesos,  
Por ke vi ekfloru, mi l'lokon fordonos.

Mi l'tempon pasigas enpense konstante,  
La horon de mia finiĝo ed morto  
El lo efektive diveni penante  
Al mi difinitan anta'e de-l' sorto.

Ho kie, ĉu ie en ond' aŭ batalo,  
Aŭ voja migrado la mort' al mi venos;  
Aŭ eble subite najbara la valo  
Jam malvarmiĝintan la polvon forprenos?

Ho, kvankam al korpo kaduka, malinda  
Egale, mortinte jam, ĉie putriĝi,  
Sed tamen proksime al limo aminda  
Pli bone mi volus post mort' trankviliĝi.

Ludadu do vivo la juna, momenta,  
Jen apud la tomba eniro trankvile,  
Ed lumu naturo la indiferenta  
Per belo eterna konstante ed brile!

Mozes Goldberg.



42.

## Ondoj ed homoj.

(El Lermontov.)

En mar' kun surda plaŭdo ed kun bruo  
Sin rulas unu post la dua ond';  
Foriras, pasas unu post la dua  
Da homoj ank'e sensignifa rond' . . .

Al ond' malvarmo, libereco sia,  
Pli kara estas, ol de-l' sun' radi';  
Animon havi volas hom' . . . sed kio?  
Malvarma pli ol ond' — anim' ĉe li.

Mozer Goldberg.

43.

## Esperanto ed Danubo.

Migrante mondon l' «Esperanta»  
Danubon estis renkontanta ;  
Lo vidas apud Fer-Portego  
Urbeto plena da bruego  
Jen sur la bordo de-l' rivero!

Sub kondukad' de inĝenjero  
Armeo tuta da Italoj, —  
Por fosi multon da kanaloj, —  
Atakas fundon per fosiloj,  
Ed truojn boras per boriloj.

Hakiloj grandaj batas, hakas;  
La dinamito pafas, krakas;  
Per levmaŝin' la derompita  
Ŝtonaj' tuj estas forigita.

Jen longa vico da vagonoj,  
Ŝarĝinte plene sin per ŝtonoj,  
Fortrenas lojn al lok' de digo,  
Necesaj por la reguligo  
De la river' en granda kvanto.

— «Ho, kjal-do, — diris Esperanto —

Feliĉo tiel vin karesas,  
Ke tre mirinde vi sukcesas?  
Ni 'stas ja amb' internaciaj,  
Ed ank' la samaj celoj niaj,  
Tre bonintencaj ed bonfaraj:  
Komunikiĝo de-l' homaroj.  
Kjal-do, ho kara kunfratino,  
Tjam la kongreso de Berlino  
Al vi favore pli sin tenis?  
Vin reguligi interprenis,  
Por interligi l'orientan  
Eŭropon ed la okcidentan,  
Pro-l' oportuno de-l' homaroj. —


Jam pasis daŭro da miljaroj  
Ke anta' solv' de ĉi-problemo  
La plej kuraĝaj el timemo  
La manojn tute lasis fali.

Cu povas vi je mi egali?  
Por mia plenefektivigo  
Necesa estas ja nek digo,  
Ed nek kanalo, nek borilo;  
Per laboreto tre facila  
Utiloj estus pli, pli grandaj,  
Ne sole nur al kelkaj landoj,  
Sed ank'e al la tuta mondo!

— «Jes» — estis nun al lo respondo —

«Vi efektive estas prava;  
Ke estas via cel' pli grava,  
Tjon certe nenju malkonfesas;  
Vi tamen Esperant' forgesas,  
Ke dum kongres' efektivigis  
Vi tjam ancor'e ne naskigis.  
Maljuste plendas vi je-l' sorto:  
Se la kongreso, pro alporto  
De bon' al unu part de-l' tero  
Tjam la plenumon de afero  
Plej malfacila entreprenis,  
Ed preske jam al celo venis,  
Tjom pli, por, sen malfacilaĵoj,  
Alporti multon da bonaĵoj  
Al tuta tera glob' ĉirka'e,  
Ekstaros nenju jam kontra'e;  
Sed progresigi ĉjuj nur penos  
Ĝis vi feliĉe l'celon venos.

Mozes Goldberg.



#### 44.

### Cigno, ezoko ed kankro.

(El Krylov'.)

---

Se inter kolegoj jam en la komenco  
En ia afero malestas konsento,  
Senfrukta restados ilia intenco,  
En lok' de afero nur estos turmento.

Okazis, ke kankro kun cigno, ezoko,  
Por ŝarĝon transporti de loko al loko,  
Triope al veturigil' enjungiĝis  
Ed tre diligente de-l' loko tiriĝis.  
Sed malgr'e ilia grandega fervoro  
Nenion alportis ilia laboro.

Ekstreme facile lo estus por trio,  
Se ili laborus nur en harmonio;  
Sed al la ĉielo la cigno sin tiras,  
La kankro obstine returne foriras,  
L'ezoko al akvo la ŝarĝon kunŝiras.

Nun kiun pravigi ed kiun kulpigi,  
Mi certe ed tute ne povus klarigi, —  
Sed la veturilo eĉ paŝon ne faris,  
Ankor'e lo staras nun, kie lo staris.

Mozes Goldberg.





## 45.

### Guto de pluvo.

(El Krylov.)

---

Guto de pluvo enfalis foje  
En grandan profundan maron.  
Ho! lo forte ekriis malĝoje  
Vidante la vastan akvaron.  
«Tien-ĉi venu granda rivero,  
Sed kion signifos unu akvero?»

Sed jen rigardu, — konko alvenis,  
Per unu gluto la guton enprenis,  
Ed bald'e nia gut' aliiĝis  
Ed kosta perlo el lo fariĝis.

Jes amikoj, la guton memoru,  
Laŭ siaj fortoj ĉiu laboru:  
Ofte la plej modesta guto  
Fariĝas perlo per unu gluto.

Mozes Goldberg.



## 46.

### Dukato.

(El Krylov.)

---

Objekton bonan se Vi penas  
Tro plibonigi en nesci',  
Vi ofte al kontra'o venas  
Pli malboniĝas nur al Vi.

Okazojn tiajn kun kompato  
Ni vidas multe en la mond';  
Ed por ekzemplo pri dukato  
Belega 'stas jen la rakont':

Foj' vilaĝano el simpluloj  
Dukaton trovis sur la ter'.  
De polvo estis en makuloj  
Malpurigita la moner'.

Da kvinkopekoj por dukato  
Plenmanon donis hom' al li.  
«Atendu» pensas li: «vi frato,  
Duoble donos jam al mi!»

Amason tutan kolektinte  
Da sablo, kret', ed kun fervor'  
Eĉ kelkajn brikojn dispistinte,  
Li tuj alpaŝis al labor'.

Sur brik' dukaton li frotadis  
Per sablo, kret'; per unu vort',  
Ke lo ekbrilu, purigadis  
Senĉese lon, per tuta fort'.

Jes, kiel fajra jam fariĝis  
Nun la dukat' en lia man';  
Sed loa pezo malgrandiĝis  
Sub la frotad' de-l' vilaĝan'.

Ĉu efektiva estintaĵo  
Aŭ fablo estas la rakont', —  
Sed povas kiel instruajaĵo  
Lo servi nun al nia rond'.

Volante fari plibonigon,  
Kiel ajn bela ŝajnas ĝi,  
Ni vidu, eble pereigon  
Ni kaŭzos ed malgajos pli!

Mozes Goldberg.



47.

### Muso ed kato.

(El Krylov).

«Najbaro!» diris mus' al rato:  
«Ĉu aŭdis vi sciigon bonan?  
Ja oni diras, ke mem kato  
Enfalis ungon en leonan.  
Ni ank'e havos jam liberon!»  
— «Ne ĝoju vane vi amato,  
Ne kredu tiun-ĉi malveran  
Novajon!» nun rediris rato;  
«Se ungon de la kat'-fripono,  
Eĉ mem tuŝetus la leono,  
Lo, certe, viva jam ne restus;  
Ol kat' pli forta nenju estus.»

Mozes Goldberg.



## Vulpo ed lupo.

(El Krylov.)

Vulp' super kokidaj' satiĝis.  
 Kaŝinte reston por provizo,  
 Sub fojno dormi lo kuŝiĝis.  
 Lo vidas, iras lupo griza.  
 «Vesperon bonan! ho baptano!»  
 Al vulpo diris lup' malsata:  
 «Kia mizer'! nek ost', nek pano,  
 Kiel suferas mi, amata;  
 La hundoj bojas ed krietas,  
 Ed la paŝtisto ne dormetas,  
 Li 'stas fidela ed gardema . . . .  
 Amik' vi estu kompatema . . . »  
 Ĉu efektive? — «Tjel precize.»  
 «Kia domaĝ'! Ĉu vi, malriĉa,  
 Ne volas fojnon? Jen sufiĉa . . . »  
 Ed eĉ ne vorto pri-l' proviza  
 Ed la restinta kokidaĵo.  
 Sed nia griza lup' malsata  
 Ne de la fojno ja deziris;  
 Lo volis iom da vjandaĵo.  
 Lup' je oreloj karesata,  
 Sen manĝo hejmen tuj foriris.

Mozes Goldberg.



## Du hundoj.

(El Krylov.)

Foj' hundo korta, fidela, Barbos',  
 Portanta servon de-l' maestr' sen ripoz',  
 Amikon sian malnovan ekvidis;  
 Sur la fenestro kusenon lo sidis.  
 Lon kjel parencon Barbos' salutadis,  
 Krietis, saltis ed voston turnadis.  
 «Nu, kiel, Ŵuĵo, vi fartas, de-l' horo  
 Al si akceptas vin via sinjoro?  
 Kjan servon al vi difinis la sorto?  
 Ja vi, kredeble, memoras ancor'e,  
 Ke iam ofte ni amb'e en korto  
 De la malsato suferis dolore.  
 «Ja peko estas plendadi feliĉon,  
 Mi havas ĉion ed vivon tre riĉan.»  
 Respondis Ŵuĵo al lo kun kontento:  
 «Mi manĝas, trinkas ĉiam sur arĝento;  
 La tempo pasas ĉe mi sen laboro;  
 Se, petolante kun mia sinjoro,  
 De petolado mi forte laciĝas,  
 Mi sur tapiŝo tre mola ruliĝas.  
 Nu, kiel ĉe vi pasadas la horoj?»  
 — «Ĉe mi?» — respondis Barboso en ploro, —  
 La voston, nazon metante al tero:  
 «Ho, frato mia, anta'a sufero!

Ed la malsato ed la malvarmego  
 Turmentas ĉiam min, ed sub pluvego  
 La mastran domon fidele gardante,  
 Sub la baril' malsekiĝas konstante;  
 Ed, se maltrafe mi voĉon eklevas,  
 Ekbaton ofte mi ank'e ricevas.  
 Nu, kial Ĵunjo, vin flatas la sorto,  
 Estante ĉiam malgranda, sen forto,  
 Dum senkompate lo min tre konsumas?  
 Vi diru, kian oficon plenumas?  
 — «Oficon kian?» Nun Ĵuĵo rediras:  
 «Ja per la postaj piedoj mi iras.»

Mozes Goldberg.



## 50.

### Az'no, kapro, urso ed simjo.

(El Krylov'.)

Foj' az'no, kapro, urs', simio  
 Kvarope sidis sub tilio,  
 Ed volis ludi en kvartato.  
 Jam ĉio estis preparata:  
 Aldo, violonoj, baso,  
 Por ke la popolamaso  
 Ravita estu per muziko!  
 Sed estis lud' sen harmonio.

«Vi haltu!» krias la simio:  
 «Ne tiel sidas vi, amikoj;  
 Vi, urso, kontra' ald' sidiĝu,  
 Vi, kapro, kontra' prim' stariĝu!  
 Ed tjel ekludos l' instrumentoj  
 Ke estos arboj, mont' kontentaj.  
 Obeis lon artistoj niaj  
 Sidiĝis unuj kontr' aliaj.  
 Rekomenciĝis la akordo,  
 Malbona tamen lud' sen ordo.  
 «Vi haltu!» la azen' detenas, —  
 «Mi la sekreton jam komprenas:  
 Tiam pli bona lud' fariĝos,  
 Se ĉiuj ni en vic' sidiĝos.»  
 Sed tamen lud' sen harmonio,  
 Malgr'e ke sidas en linio.  
 Rekomenciĝis malkonsente,  
 Kjel sidi kun la instrumento.  
 Jen ĝustatempe al disputo  
 Alflugis tien najtingalo;  
 Al lo alpaŝis ĥor' la tuta,  
 Ed diras: «Vi nin en detalo  
 Klarigu en kjo ni eraris?  
 Ja ĉion ni por lud' preparis,  
 Jen aldo, baso, violono . . .  
 Nur kiel sidi estu bona  
 Vi nun al nia rond' konsili!»  
 — »Ho, vane! — diris lo al ili —

Por lud' orel' pli delikata  
Ed senc' ja estas bezonata;  
Kjel ajn sidiĝos vi ludantoj,  
Ne taŭgos vi por muzikantoj.»

Mozes Goldberg.



51.

## Kato ed ezoko.

(El Krylov'.)

Okazis, ke denta ezoko malica  
Okupi sin volis je kata ofico.  
Ne estas sciata la kaŭzo de tio:  
Ĉu lon turmentegis malica envio,  
Aŭ en maljuneco jam fiŝa la tablo  
Fariĝis al lo, eble, tro malagrabla.  
L' ezoko ekpensis ekpeti la katon,  
Grenejon kaptadi musetojn ed raton.  
«Ĉu scias, amiko, vi tiun laboron?  
Vi vidu ed gardu vi vian honoron,  
Por ĉiu afero senc' estas bezona!»  
Avertis l'ezokon kateto la bona.  
— «Sufiĉe! ĉu estas muset' maloftaĵo!  
Plenumis pli multe jam mi da grandaĵo,  
Ed kaptis eĉ grandan amason da perĉoj.»  
Respondis l'ezoko al kato en ŝercoj.  
Ed tiel jen ili ekiris feliĉe. . .  
La kat' sin amuzis, manĝegis sufiĉe



Ed poste l'ezokon viziti rapidas.  
 Jen kuŝas l'ezok', apen' viva, lo vidas,  
 Ed tutan la voston mordetis jam rato.  
 Por lon revivigi nun, tuj, de kompato,  
 Lon ree fortrenis la bona kateto  
 En lokon anta'an for, for en lageto.  
 Memoru ezoko Vi tiun sentencon:  
 Je mus' ne deziru estonte potencon.

Mozes Goldberg.



52.

## Sturno ed kukolo.

(De Ĥemnicer.)

Foj' ie en urb' aŭ vilaĝo  
 Al sturno prosperis el kaĝo  
 Forflugi liberan aeron.  
 »Ĉu estis, vi diru la veron  
 Pri nia kantado parolo?» —  
 La sturnon demandis kukolo —  
 «Vi pri najtingal' kion aŭdis?»  
 — «Lon ĉiu tre gloris ed laŭdis.»  
 «Ĉu aŭdis vi pri la alaŭdo?»  
 — «Jes, neesprimebla la laŭdo.»  
 «Pri turd' kion aŭdis, amata?»  
 — «Lo ank' ĉie estas laŭdata.»  
 «Ed pri mi ĉu aŭdis vi ion?»

— «Ne, pri vi mi aŭdis nenion.»  
«Nu bone», kukol' sin konsolas  
Mi ank'e pri si nur parolas.

Mozes Goldberg.



53.

## Denaro laŭdata.

(Araba.)

Laŭdata vi, denaro, flavruĝa, brula, bela,  
Migranto malproksima de-l' lando subĉiela!  
Tre laŭta via gloro, potenca vi monero,  
En vi kaŝita estas donaco tre mistera.  
Al vi ja ĉiu brulas per nepretteksta amo,  
Ĉu via kor' metala ne estas mia sama?  
Sukceson anta'diras al ni via vizaĝo;  
En kies poŝ' sonoras vi, tiu tre kuraĝa.  
De malproksime logas vi per rigard'afabla,  
En mult' da dunaskitoj vi estas tre agrabla.  
Vi regnas je-l' aferoj de ĉiu land', centjaro;  
Al feliĉuloj estas feliĉ' de vi, denaro!  
La zorgon al kolegoj forgesi vi devigas,  
Ed brilon de plenlumoj bril' via mallumigas.  
Vi karbon la brulruĝan de kolereg' estingas  
Per vi ja liberecon kaptita sklav' atingas.  
Se punon mi ne timus de Dio la senmorta,  
Jam dirus mi kuraĝe: «Denaro la plej forta!»

Mozes Goldberg.



## Denaro mallaŭdata.

Pereu, malbenita denaro, vi ruzulo,  
 Lumflava, duvizaĝa, flatulo, perfidulo!  
 Rigardon sorĉas via duobla vizaĝeto,  
 Per lum' de am' briletas vi kiel fraŭlineto.  
 Per brula amo via logiĝas eĉ saĝuloj;  
 Ed la koler' de Dio tondregas je pekuloj.  
 Ja se ne vi, malofte aperus jam fripono;  
 De dekstra man' seniĝus nenia jam persono.  
 Jam nokte la nigrantojn ne gardus l'avarulo,  
 Neniam la ŝuldantojn riproĉus la riĉulo.  
 Avid'rigardojn timus nenia jam estaĵo, —  
 Mult', mult' kaŝita estas en lo da malbonaĵo.  
 Ne estas ĝis la fino fidela lo servanto;  
 Sin en mizer' deturnis de-l' voj de-l' forkuranto.  
 Per loa muĝ' karesa logita ĉiu restas;  
 L'ĵetint' lon de krutaĵo la plej feliĉa estas! —

Mozes Goldberg.

## Tri Budrys'oj.

(El Mickiewicz.)

Budrys, forta ed sana, maljunulo Litvana,  
 Sur la korton alvokas tri filojn:  
 «Iru tuj en la stalojn, selu bone ĉevalojn,  
 Ed akriĝu la glavojn, ĵetilojn.

Kuras famo en rondo, por tri flankoj de-l' mondo  
Al ni Vilno trumpetos ordonojn:  
Olgerd falos en Rus'jon, Princo Kejstut la  
Prus'jon,  
Ed Skirgello atakos Polonojn.

Fortaj, sanaj vi estas; iru, filoj, mi restas;  
Litvaj dioj konduku vin, benu!  
Por la vojo utila, bona vorto konsila:  
Tri vi estas, tri vojojn vi prenu.

Un'a devas elkuri, kun Olgerdo veturi  
Kontra' Nov'grad post Ilmen kuŝanta;  
Tie vostoj zibelaj, la ornamoj tre belaj,  
En amasoj la rublo sonanta.

Dua devas elfali, sub Princ' Kejstut batali:  
Pereadu Krucistoj-hundfratoj!  
Tje sukceso la ora, drapo mire kolora,  
Brilantoj en pastraj ornattoj.

Tria post la Njemen, en Skirgella la treno,  
Nur malriĉan akiron li trovos;  
Tie inda nur havo: bona ŝildo ed glavo,  
Ed Polinon kunpreni li povos.

Super ĉiuj virinoj, plej amindaj Polinoj!  
Tjel gajetaj kjel junaj katetoj;  
Blanka, roza la vango, kvaz'e lakto ed sango,  
Ed la ok'loj — brilantaj steletoj.

El Polon'jo, junaĝa batalanto, kuraĝa,  
Anta' jaroj mi portis edzinon. . . .  
Jam ne batas la koro — kun malĝojo, doloro  
Rememoras mi vian patrinon.»

Ed, doninte konsilojn, li benadis la filojn;  
La armitajn forportis ĉevaloj.  
Aŭtun'-vintro sin trenas, filoj reen ne venas;  
Eble falis en sangaj bataloj. . . .

Per la neĝo kovrita, rajdas viro armita,  
Sub la burko objekto tre granda.  
«Filo! sub la mantelo, rusa mon' en sitelo?»  
— «Ne, patreto, filino Pollanda!»

Per la neĝo kovrita, rajdas viro armita,  
Sub la burko akiro tre granda.  
«Ella Prus'jo! sak' plena, kun la sablo sukkena?»  
— «Bofilino, patreto, Pollanda!»

Per la neĝo kovrita, tria viro armita,  
Ion grandan li kaŝas sub vesto:  
Budrys jam ne atendis, invitadi li sendis  
Por la tria edziga la festo.

Antoni Grabowski.



## E n S v i s ' j o .

(El Slo w a c k i.)

## I.

Ek ŝi malaperis kjel songo, kjel ora,  
 Mi svenas d'enuo, sekiĝas dolora.  
 Ne scias mi kjal-do l'anim' al la ĉjeloj  
 N'elfugas el cindroj post ŝi, al Anĝeloj?  
 Pro kio ne flugas al mondo alia,  
 Al tiu savita, amata la mia!

## II.

En Svisaj la montoj un' estas kaskado :  
 De-l' Aar lazura la akvo-falado.  
 Ke tjen ekrigardu la kap' turniĝanta!  
 Vi vidas ĉjelarkon sur kavo ŝaŭmanta?  
 Sur neb'loj arĝentaj sin tuta pendigas,  
 Ed nenjo lon miksas, ed nenjo forigas ;  
 Nur tempe ŝafido la blanka trairas  
 La arkon ĉielan, en valo sur randoj  
 Mordeti florantaj je-l' rozoj, juglandoj ;  
 Aŭ ia kolombo, kju akvon deziras,  
 Kjel fjera, estante al briloj simila,  
 La arkon rapide traflugas, la brila.  
 Mi tje ŝin ekvidis! tuj amo min prenis ;  
 Ke ŝi el pluvarko, el ŝaŭmo elvenis,  
 Mi kredi komencis, la kredo nun restis :  
 Tjel luma de sunaj la radjoj ŝi estis!

Tjel plena ŝi estis da lumo anĝela!  
 Ed per la pupilo lazura tjel hela!  
 Kjam ok'loj transiris de pjed' al plekt' hara,  
 Por ok'loj ŝi estis amata ed kara;  
 Ed post tiu sento nin ami iganta  
 Kor' iris, post koro l'animo sekvanta;  
 Ed tiel rapide komencis l'amado,  
 Ke volis mi flugi al ŝi tra-l' kaskado;  
 Mi timis, ŝi flugos kjel pala vidaĵo;  
 Pli fru' ol animo kun krio vekig'os,  
 En arko ĉiela, kaskad', profundaĵo  
 Ŝi falos, sin solvos ed de mi forig'os.  
 Mi timis kjel homo en songo magia,  
 Ĉar jam mi ŝin amis, ŝi estis jam mia.  
 Mi tiel ekvidis ŝin solan, sub hela  
 Pordego kolora, de-l' arko ĉiela.  
 Surblovis min ĉarme de-l' amo ekblovo,  
 Mi, ok'ojn subinte, ekstaris sen movo.  
 (Komenco.) Antoni Grabowski.



57.

## Al la virino.

(El Krasiński.)

Kvank' logos vi koron per ok'la kristalo,  
 Turmentos per vana de pensoj sekeco,  
 Vi viva ne estos ancor' idealo,  
 Ne estos ancor'e virina beleco.

Modesto sen scio, la buŝ' de karmino,  
Ank' hodj'e malmultan nur havas valoron —  
Ne esti — elkreski vi devas virgino,  
Pasante la tutan de-l' mondo doloron.

Inspiroj, turmentoj, de larmoj multeco  
Ekbrilos per radjo de-l' sankta Dieco,  
Ed lumos eterne vizaĝa la palo;

Kjam plektos sur via la frunto marmora  
De-l' forto koronon la vivo dolora :  
Vi tiam Beleco ! tiam Idealo !

Antoni Grabowski.



58.

## D e m a n d o .

(El A. Odyniec.)

Kju divenos, kju lon vidas,  
En la ok'la en speg'leto  
De-l' knabino, kio sidas :  
Anĝelete aŭ djableto ?

Sidas tie sur la rando  
Senflugila un' knabeto ;  
Ĉju lin vidas — sed demando :  
Anĝelete aŭ djableto ?



Foj' de li, el sub palpebro,  
Brilas ĉjela tja lumeto,  
Ke vi ĵurus tuj en febro:  
Serafimo, ne djableto!

Sed jen pikas vin petole  
Rigard' akra, kjel pingleto,  
Vi ekkrius kontra'vole:  
He, satano, ne djableto!

Mondo penas tjal eterne  
Pro la solvo de-l' ligeto:  
En fraŭlina okl' interne  
Anĝeleto aŭ djableto?

Antoni Grabowski.



59.

## Vana plendo.

(El A. Asnyk.)

Vana la plendo — ed sopir',  
Senforta la malbeno!  
Pasintajn formojn nenja mir'  
Jam kaŭzos al reveno!  
Mond' ne redonos en regres',  
Vidaĵojn de-l' revado;  
Eĉ fajro, glav' ne estas ĉes'  
Al pensoj en kurado!

Kun vivaj iri devas ni,  
Ed novan vivon doni,  
Sed ne per velka laŭr-foli'  
Obstine kapon kroni.  
Reen ne iras viva ond'!  
Senfrukta plendo via,  
Koler' senforta, ĉar la mond'  
Sur vojo iros sia.

Antoni Grabowski.



60.

## A l l a v i r i n o .

(El Marja Konopnicka.)

Ĉu vi scias, vi bela, ed vi ridetanta,  
De kiu la buŝeton disklinas gajeco,  
Kjon signifas «mi amas», la plej sankta vorto,  
Kiu falas el brusto, kjel saĝeto ora,  
Ed kiel la kurteno de reĝa purpuro,  
Vin tute apartigas, per tuŝiĝo rozan,  
Ed tremantan per virgaj songoj de feliĉo,  
De ĉiuj, ĉiuj homoj, sur la tuta tero,  
Por ke vi nur al unu malfermu la brakojn?

Ĉu vi scias pri tio, papiljo ed floro,  
De matenoj printempaj vi kanta birdeto,  
Ke tiu sama horo, en kju buŝo via  
Murmuretas la vorton, estas hor' de miroj?

Ke tiam lume, hele, fariĝas sur mondo,  
Ke arĝenton fluigas ĉiuj vivaj fontoj,  
Ke rozoj en burĝonoj ruĝiĝas printempaj,  
Ke mirindaj vidaĵoj, facilaj ed songaj,  
Korp'-fariĝas sub via tremanta la mano?  
Ke en via pupilo, kjel en prismo l'suno,  
La vivo siajn brilojn rebatas laŭ miloj,  
Ed refleksas la radjon sian brilantan? . . .  
Ke nokto sian kronon arĝentan de-l' kapo  
Al pjedoj viaj ŝutas per malvarmaj rozoj?  
Ke per via tuŝiĝo eĉ tremas la steloj?

---

Ĉu vi scias pri tio, ke tiu-ĉi vorto  
Vin faras la pastrinon de puraj altaroj?  
Ke tiu sento, kiu la virgajn ĉjelruĝojn  
Ĵetas sur la blankecon liljan de vizaĝo,  
Ed per fajro djamanta en ok'lo elbrilas,  
Ne nur feliĉo estas, sed ora pesilo,  
Kiu eston tutmondan tenadas en movo;  
La unua bruligo en grandega fajro,  
Kiu mondon per siaj briloj ĉirka'prenas,  
L'unua ero en la ĉeno de-l' kreado? —  
Ĉu vi scias, ke kiam krepuskoj misteraj  
Eldonis la junulajn formojn de la tero,  
Kiu staris ancor'e nuda mez ĥaoso,  
L'unua vorto, kiun Dio sur la Ĉjelo  
Diris al tero estis la vort': «mi vin amas!»

---

Aŭskultu jen! «Mi amas» tute ne signifas:  
Mi volas karesata reĝi vian domon;  
Mi volas pasi vivon sternatan per floroj,  
En viaj kisoj volas mi droni flamanta;  
Mi volas, ĉjumatene suno al mi lumu;  
Mi volas, ĉjuvespere lampon diamantan  
Lun' arĝenta bruligu super via kapo;  
Mi volas, ke vi aŭdu min la tutan tagon,  
Ĉiam min salutadu per via rideto;  
Kantojn al mi kantadu kun la najtingalo;  
Volas vivi el via laboro ed ŝvito;  
Mi volas, ke vi estu mia ombro, eho,  
Ĉiam responda por mi la malliberulo.

---

Ne, — «mi vin amas» tio signifas: mi volas  
Kun vi levi la pezon, nomatan la vivo;  
Esti de via domo lumo ed ornamo,  
Ed porti al vi pacon, trankvilon ed sanon.  
«Mi amas» tjo signifas: viaj idealoj  
Ed viaj celoj estas ank' egale miaj;  
Ni laboradu kune, ke tagiĝo blanka  
Pli frue disbrilu sur tero!  
Volas, ke via vojo estu mia vojo,  
Viaj deziroj estu ank' deziro mia,  
Volas, vi estu mia voĉo konsciencia,  
Kun si min konduku — al Dio.  
Mi volas, ke kurante en prem' reciproka,  
Kjel du spiritoj en la regnon d'eterneco,

Ni disradjigu tie, sur mondo malluma,  
    La stelajn vojojn de la estonteco.  
Volas, per via scio disvastigi mian,  
Ed konservadi kiel ĵuron vian vorton;  
Kun vi mi volas revii, sopiri ed kredi  
    En de spirito nerompeblan forton.  
«Mi amas» — tjo signifas: kun vi mi partigi  
Volas panon de peno, de larmoj, doloro;  
Ok'lojn viajn en tagoj malĝojaj gajigi,  
    Esti la ŝildo de via honoro.  
Esti sur via brusto kiel blanka rozo,  
En kiu brulas ia mistera flameto;  
Mi volas esti kiel rubina sig'lilo  
    Sur via buŝo, sen vorto.  
Forgesita mi volas vivi en trankvilo  
En ia anguleto, sed al vi komuna . . .  
Ed al nia infano, super la lulilo,  
    Kanti kantetojn en nokto senluna.

---

«Mi amas!» tjo signifas: spirito libera!  
Mi ne volas flugilojn ligi viajn helajn  
Alforĝi vin al zorgo malvasta, mizera,  
Vin, kiu al kutimis, kjel aglo flugadi  
Laŭ de pensoj ekblovo, sur plej altajn suprojn,  
    Ed en lazuroj neston konstruadi.  
Mi ne volas multpezi al vi kjel kateno,  
Ligi vin kun la tero per la fera ĉeno;  
Mi volas nur, ke nomu vi min, ho amata,

Spirito al vi parenca ed frata.  
«Mi amas!» tjo signifas: por vi mi nun volas  
Esti ĵuro de vero, de bono, de belo  
La amata de via animo infano,  
Esti la revo via — pri la ĉjelo.  
Esti al via domo la hedero blanka,  
Esti al via frunto gardo de la bruloj,  
Mi volas esti via penso, via brako,  
Via amiko-edzino.

---

Se ne batas en via brusto, ho virino,  
Kor' kapabla por amo de tia alteco,  
Ne diru vi: «mi amas», al nenju sur tero,  
Ĉar tiu, kiu ligos kun vi sian sorton,  
Rigardante vin per la malgajaj okuloj,  
Ke li vivas, li nenjam eldiros la vorton;  
Spirite enkreskinte en mallibereco  
Li nenjon faros por la posteuloj.

Antoni Grabowski.

---

61.

**Serenado de Apollo.**

(El la fablo greka de H. Sienkiewicz)

---

El de Parnaso plej altaj supraĵoj,  
Kie en brilo ed inter bluaĵoj,  
La inspiritaj, nur min adorante,  
Muzoj en kantoj min gloras konstante:

Mi, dio luma, mi, la adorata,  
Venas! ... La brakojn malfermu amata!  
Sur via brusto, momenton simila,  
Pasos l'eterno al mi, Erifila! ...

— — — — —  
— — — — —

Brakojn malfermu ed venu al koro!  
De mi eterna atendas vin gloro ...  
Ed super ĉiu Olimpa diino  
Nom' via estos glorata sen fino ...  
Bela! mi donos al vi nemortecon,  
Mi tiel vian ornamos belecon  
Per la potenco de-l' vorto la dia,  
K' en tuta Grek'jo reĝino nenia  
Estos egale kun vi adorata!

— — — — —  
— — — — —

Brakojn malfermu, malfermu, amata!

— — — — —  
— — — — —

Siros mi for de la mar' la lazuron,  
De la ĉjelruĝo — la oron, purpuron,  
Brilon de steloj, la roson de floroj;  
Ed tjela luma, brilanta teksaĵo  
Estos por mia amata de-l' koro:  
De la Kiprido ĉjelarka vestaĵo ...

Antoni Grabowski.



## R e v a j o .

(De P. Dalman.)

Sur la valo neĝa vento  
 Blovas ĉiam pli;  
 Fajro sur kameno mia  
 Krakas ĉirka' mi.

Ĉe-l' kamen' el pipo ringe, —  
 Fumon lasas mi . . .  
 Ĉiuj remomoroj miaj  
 Flugas for kun ĝi.

Kje 'stas floroj ed esperoj,  
 La juneco d' or'?  
 Kiel vento la blovanta,  
 Ili flugis for!

Vent' sen celo, mi sen celo  
 Kun vi, fumo, tri . . .  
 Tri sen celo sur la mondo  
 Kune flugu ni!

Antoni Grabowski.





## L a k o r o n e t o .

(El boheme.)

De-l' arbaro princa  
 Blovas la venteto;  
 La knabino kuras  
 Al la rivereto.

Kiam en la vazojn  
 Akvon ŝi enprenas,  
 Sur ŝaŭmanta ondo  
 Koroneto venas.

Bela koroneto  
 Dolĉa laodoro:  
 De la violetoj,  
 De la roza floro.

— «Diru, koroneto,  
 Kiu en mateno  
 Plantis vin en mola  
 Tero de-l' ĝardeno?»

Mia don' al tiu,  
 Koroneto flora,  
 Estos la brilanta  
 Mia ringo ora.

Diru, koroneto,  
Kiu en mateno  
Siris la floretojn,  
Ligis per fadeno?

Mia don' al tiu,  
Koroneto kara,  
Estos tiu bela  
Mia pinglo hara.

Diru koroneto,  
Kiu en vespero  
Ĵetis vin malvarman  
Akvon de-l' rivero?

Donos mi al tiu,  
Donos mi doneton,  
De la kapo mia  
Rozan koroneton.»

La knabino kaptas  
Koronejon ĉerman, —  
Falas, ha, ŝi falas  
Akvon la malvarman.

Antoni Grabowski.



64.

**S e , t j a m .**

(El A. Tolstoj.)

---

Se ekami, tjam potence ;  
Se minaci, tjam intence ;  
Se insulti, en varmego ;  
Se ekbati, per fortego.

Se disputi, kun sincero ;  
Se starigi, pro afero ;  
Se pardoni, per animo ;  
Se festeni, jam sen limo.

Antoni Grabowski.



65.

**D i s t i ĥ o .**

(El latine.)

---

Kiam vi estos feliĉa, vi multajn kalkulos amikojn,  
Nuba se estos la temp' — sola nur estos vi tjam.

Antoni Grabowski.



66.

## S e n t e n c o .

(El itale.)

Se zorgon internan el ĉia  
Fruŝt' legi vi povus, kunfrato,  
Kiel ofte la sento envia  
Tjam cedus al kora kompato!

Antoni Grabowsk



67.

## E x c e l s i o r .

(El Longfellow.)

La nokto rapide la ombrojn delasis,  
Kiam Alpan vilaĝon junulo trapasis,  
Mez neĝo ed glacio standardon portanta  
Kun tia devizo mirinde sonanta:  
Excelsior!

La frunto malgaja, ed ok'lo junula,  
Kiel glavo en suno, flamanta ed brula;  
Ed sonis, kiel klara trumpeto arĝenta,  
La vort' nekomprena tra nokto silenta:  
Excelsior!

Li vidis, en loĝoj feliĉaj, tjel ĉarme  
Jen brulis la fajro lumante ed varme;  
En supre glaciejoj minace sin trenis;  
El lipoj junulaj l'sopiro elvenis:  
Excelsior!

«Ne provu la pason!» maljuna hom' diris,  
En supre sin nigra ventego kuntiris,  
Profunda la akvo, ŝiranta la ondo!»  
Ed laŭte eksonis la klara respondo:  
Excelsior!

«Halt'!» diris knabino. «Kap' via de-l' laco  
Sur tiu-ĉi brusto ripozu en paco!»  
Larm' staris en blua la ok'lo brilante,  
Sed tamen respondis l'junul' sopirante:  
Excelsior!

«Ho! gardu vin anta' branĉ velka de-l' pino,  
Ho! gardu vin anta' terura lavino!»  
Lin laste por nokto salutis hom' ia!  
El alte rediris la vorto adi'a:  
Excelsior!

Kun al la ĉielo levita rigardo  
La piaj monaĥoj de-l' Sankta Bernhardo  
En frua mateno la preĝojn murmuris,  
Ed krio skuanta l'aeron trakuris:  
Excelsior!

Migranto, duone l'en neĝo fosita,  
De-l' hundo fidela li estis trovita;  
Li tenis ancor'e en man' glacja sia  
Standardon kun stranga devizo jen tia:  
Excelsior!

Ed en duonlumo la griza, malvarma,  
Li kuŝis senviva, sed bela ed ĉarma,  
Ed de malproksime, el klara la ĉjelo,  
Defalis la voĉo, falanta kjei stelo:

Excelsior!

Antoni Grabowski.



68.

## La pluva tago.

(El Longfellow.)

La tago malvarma, malgaja sensuna;  
Ne haltas la ventoj ed pluvo aŭtuna;  
La vin'jo je-l' muro putranta sin tenas,  
Sed ĉiu ekblovo la foljojn deprenas,  
Ed la tago — malvarma, sensuna.

Mia vivo malvarma, malgaja, sensuna;  
Ne haltas la ventoj ed pluvo aŭtuna;  
Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj,  
Sed falas en vento esperoj velkintaj,  
Ed la tagoj — malvarmaj, sensunaj.

Ekhaltu, ho koro malgaja, ne plendu!  
Post nuboj la suno radjantas — atendu!  
Ne sola vi tiel kun sorto batalas,  
En vivon de ĉiu la pluvo ja falas,  
Kelkaj tagoj — malvarmaj, sensunaj.

Antoni Grabowski.



69.

**La sago ed la kanto.**

(El Longfellow.)

---

Mi pafis sagon en l' aeron,  
Ne scias kje lo falis teron;  
La forfluganta tjel rapidis,  
Ke mi la kuron eĉ ne vidis.

Mi spiris kanton en l' aeron,  
Ne scias kje lo falis teron;  
Eĉ la plej bona akr'vidanto  
Ne sekvos flugon de la kanto.

Mi longe poste, unu tagon,  
En kverko trovis mian sagon;  
La tutan kanton kun muziko  
Mi trovis en la kor' d'amiko.

Antoni Grabowski.



70.

**La renkonto de ŝipoj.**

(El angle.)

---

Kjam ni sur maroj silentaj vojiras,  
Tagoj ed noktoj eterne sin tiras,  
Ho, kiel dolĉe, komprenas ŝipano,  
Velon rekonti sur la oceano!

Ĉiu ok'lo radjas foje,  
«Ŝipo hoj!» ni krias ĝoje;  
Dume venas la respondoj:  
Sonas «Ŝipo hoj!» sur ondoj.

Ed malrapide ni venas proksime,  
Pri niaj karaj parolas intime, —  
Sed nin disigas adi'oj turmentaj,  
Por revojiro sur maroj silentaj.

Antoni Grabowski.



71.

## Sonoriloj de vespero.

(El T. Moore.)

Sonoriloj de vespero, sonoriloj de vespero!  
Kiom ili rakontadas pri juneco ed espero,  
Pri la domo de gepatroj, pri la dolĉa kora ĝojo,  
Kiam mi ilian sonon aŭdis je la lasta fojo!

Longe, longe jam forpasis tiuj de-l' ĝojeco horoj!  
Ekdorminte je eterne jam ne batas multaj koroj.  
En la tomboj ili loĝas post la ĝojo ed sufero:  
Ne por ili la muziko, sonoriloj de vespero!

Ank'e, kiam mi ripozos je eterne en trankvilo,  
Ne ekhaltos la batado de vespera sonorilo,  
Dum kun kanto novaj bardoj paŝos jam sur  
nia tero

Ed vin aŭdos ed vin laŭdos, sonoriloj de vespero!

Antoni Grabowski.





**La trovo.**

(El Götthe.)

Foj' en la arbaro  
 Tjel sole mi iris,  
 Ed serĉi mi nenjon  
 En pensoj deziris.

Mi vidis en l'ombro  
 Jen staras floreto:  
 Kjel steloj lumanta,  
 Kjel blua ok'leto.

Mi volis lon ŝiri,  
 Sed plore lo diras:  
 «Cu por ke mi velku,  
 Vi tjal min deŝiras?»

Ed mi lon elfosis  
 Kun ĉju radiketo,  
 Alportis ĝardenon  
 Ĉe mia dometo;

En loko trankvila  
 Replantis karese;  
 Nun kreskas lo, branĉas,  
 Ed floras senĉese.

Antoni Grabowski.



## Saluto de maro.

(El Heine.)

Thalatta! Thalatta!  
 Mi vin salutas, eterna mar'!  
 Mi vin salutas dekmil foj',  
 El koro ĝojanta,  
 Kjel vin eksalutis  
 Dekmil grekaj koroj,  
 Fortaj en mizero, hejmen postulantaj,  
 En mondo gloraj, grekaj koroj.

Balancis sin ondoj,  
 Balancis ed bruis,  
 La suno verŝis sur ilin rapide  
 La rozajn ludantajn lumojn;  
 La timigitaj mevaj tiroj  
 Flugadis for, laŭte kriante,  
 Frapis la hufoj, sonoris la ŝildoj,  
 Ed malproksime sonis kjel venk-krio:  
 «Thalatta! Thalatta!»

Mi vin salutas, eterna mar'!  
 Kjel lingvo patr'ja bruas via akvo,  
 Kjel sonĝoj infanaj io briletas  
 Sur via vasta balanca ondar'.  
 Al mi rememoro rakontas denove  
 Pri ĉju amata bela ludilo,

Pri ĉiuj brilantaj donoj kristnaskaj,  
Pri ĉiuj koralaj ruĝaj arbetoj,  
Orfiŝoj, perloj ed konkoj koloraj,  
Kiujn vi kaŝas mistere,  
Malsupre en domo kristala.

Ho, kjel mi enuis en dezerta fremdo!  
Kjel floro velkinta  
En la kaps'lo de-l' botanikano,  
Kuŝis la kor' en la brust'.  
Mi sentas, kvaz'e longan vintron  
Malsana mi sidus en ĉambro malluma,  
Ed nun mi lon lasas subite,  
Ed brile kontra' mi radjas  
La smaragda printempo, vekita de-l' suno,  
Ed bruas la blankaj arboj florantaj,  
Ed la junaj floroj min rigardas  
Per siaj ok'loj la bonodoraj,  
Ĉjo sonas, aromas, respiras ed ridas,  
Ed en blua ĉjelo kantas la birdetoj —  
Thalatta! Thalatta!

Vi brava kor' retiriĝa!  
Kjel ofte, maldolcê-ofte,  
Vin premis de la Nordo barbarinoj!  
El grandaj ok'loj venkantaj  
Ili pafis brulantajn sagojn;  
Per vortoj kurbe glatitaj  
Minacis fendi mian bruston;

Per kojnoskribaj biletoj disrompis  
Mizeran cerbon mian surdigitan —  
Vane mi tenis kontra'en la ŝildon,  
La sagoj sibilis, la batoj krakis,  
Ed de la nordaj barbarinoj  
Mi estis premita ĝis la mar' —  
Ed libere spirante mi vin eksalutas,  
Amata, savanta mar',  
Thalatta! Thalatta!

Antoni Grabowski.



74.

## Embaraso.

(Kanteto germana.)

Mi volus al vi diri ion,  
Sed kion, mem ne scias mi;  
Ed se vi min demandus tion,  
Mi nur respondus tion-ĉi:  
    El tuta kor' mi amas vin,  
    Nur sole vin, nur vin!  
Se kanti kanton mi ekprovas  
Irantan al vi al la kor',  
Mi sole unu vorton trovas  
En la anim' je ĉia hor':  
    El tuta kor' mi amas vin,  
    Nur sole vin, nur vin!

Mi volus skribi letereton,  
Malkovri mian kor' al vi,  
Tro malfacile! nur vorteton  
Mi skribas ed ne scias pli:  
El tuta kor' mi amas vin,  
Nur sole vin, nur vin!

Antoni Grabowski.



75.

### Mi rakontis.

(El Vejnberg.)

Mi rakontis al maro senborda  
Pri la grandaj turmentoj en koro, —  
Ed per bruo mallaŭta de-l' ondoj  
Lo respondis al mi kun favoro.

Mi rakontis al vento rapida,  
Ke ne povas mi spiri libere, —  
Ed el landoj lo iaj mirindaj  
Al mi portis tuj freŝon aere.

Mi rakontis al verda arbaro  
De la vivo malgaja dolorojn, —  
Ed en ombro lo tuj min dormigis,  
Sancelante foliojn ed florojn.

Mi rakontis al suno varmega,  
Ke mi vidas nur tagojn malklarajn, —  
Varmigantajn ed lumajn radiojn  
Lo tuj sendis al mi malavarajn.

Mi rakontis al homo-kunfrato  
Pri la vivo senĝoja, — ed li,  
Iel strange movinte la ŝultrojn,  
Tre rapide foriris de mi.

Eduard Haller.



76.

## Trinku vinon!

(El Petöfi.)

Kju amatinon havas nenian —  
Trinku li vinon!  
Ed al li ŝajnos, ke nomas sian  
Ĉiun knabinon!

Trinku li vinon, kiu en poŝo  
Ne havas monon!  
Tiam atendos mondaj riĉecoj  
Lian ordonon!

Trinku li vinon, kiu sin trovas  
En malfeliĉo!  
Ĉion forgesos li, tiam estos  
Lia feliĉo!

Ho! mi nun estas sen amatino  
Ed sen moneto!  
Ed malfeliĉa, tial trioble  
Trinkas poeto!

Ferdinand de Kanaloŝŝy-Lefler.



77.

## F e l i ĉ o .

(El Petöfi.)

Feliĉa, al kiu donita  
Per mano benanta de-l' sorto:  
La vivo por vino, virinoj,  
Por sia patrujo la morto.

Ferdinand de Kanaloŝŝy-Lefler.



78.

## K u ŝ a s s o m e r o .

(El Heine.)

Kuŝas somero la varma  
Sur via rozeta vangeto,  
Kuŝas la vintro malvarma  
En via malgranda koreto.

Tio-ĉi bald'e sin ŝanĝos,  
Ho mia karega trezoro!  
Vintro sin trovos sur vangoj,  
Somero la varma en koro!

Ferdinand de Kanaloŝŝy-Lefler.



79.

## Latva popola kanto.

Mi en kampo kapon metos  
Por defendi patrolandon.  
Mi pli vole kapon donus,  
Ol mi donus patrolandon.

Bruu, bruu, fulmodio,  
Rompu ponton sur la Dina,  
Ke ne venu malamikoj  
En la mian patrolandon.

Landoj de tri reĝoj bruas  
Kie fratoj ĉevaliras,  
Fortaj viroj kiel kverkoj,  
Glavoj ŝtalaj sonoregas.

Kie iros vi frateto,  
Tie iros mi kun vi;  
Kie glavon vi pendigos,  
Tie koroneton mi.

Rudolf Libeks.





## Malgrand'-rusa kanteto.

---

Jam malsupre suno staras,  
 Jam rapide vesperiĝas . . .  
 Kion do knabino faras,  
 Kial do ŝi ne montriĝas?

Ĉu patrino ne permesas?  
 Aŭ aliu jam ŝin tenas?  
 Ed ŝi dolĉe lin karesas  
 Ed al mi nun ne elvenas?

«Ho, knabino! per fiero  
 Vi fariĝis nefidela:  
 Kial do vi en vespero  
 Ne elvenis, mia bela?»

— Ho karulo! tempo pasis,  
 Ed ĝusttempe mi ne venis,  
 Ĉar gepatroj min ne lasis,  
 Ĉar gefratoj min fortenis» . . .

«Ne, ne ili vin fortenis!  
 Diru simple ed sincere:  
 Malbelulo mi ne venis,  
 Ĉar ne amas vin plu vere!»

Ha, mi vidas, kion faras  
 Karulino malfidela:  
 Kun aliu ŝi nun staras,  
 Pli feliĉa ed pli bela . . .

Ivan Lojko.



## P r o f e t o .

(El Lermontov.)

De kiam, laŭ volo de Supra Juĝanto,  
 Mi ĉionscianta fariĝis profeto,  
 Malvirton mi sentas en ĉiu vivanto,  
 Malicon mi vidas tra ĉiu rideto.

Mi altajn principojn de amo ed vero  
 Komencis prediki al miaj kunfratoj,  
 Sed ili min batis kun granda kolero  
 Per ŝtonoj, kuŝantaj sur placoj ed stratoj.

Kun cindro sur kapo, kun kora doloro,  
 Mi urbojn forlasis sen ia havaĵo,  
 Ed nun en dezerto — de Dia favoro  
 Nur ion mi havas por mia nutraĵo.

Laŭ sankta ordono de Anta'tempulo  
 Al mi ĉiuj bestoj volonte servadas,  
 Ed steloj ĉe vortoj de mi, dezertulo,  
 Pli ĝoje radias, pli hele lumadas.

Sed se iafoje tra urbo bruanta  
 Mi en rapideco pretere pasadas,  
 Min popolamaso reunkontas mokanta  
 Ed maljunularo memfide diradas:

« Rigardu, infanoj, Vin edifigante,  
Li estis fera, kun ni malpacadis;  
Malsaĝa, li volis kredigi nin vante,  
Ke Dio al homoj per li paroladis.

Jen frukto de lia obstina vanteco!  
Jen pala, malgrasa, malgaja profeto,  
En vesto ĉifona, simila al reto —  
Ĉe ĉiuj li estas en malestimeco.

Ivan Lojko.



82.

## A l a ŭ d e t o .

(El boheme.)

Sarkas knabino kanabon  
Apud ĝardeno sinjora;  
Ŝin alaŭdeto demandas:  
«Kial vi tiom dolora?»

— «Gaja mi esti ne povas,  
Ho vi birdeto — kantanto,  
Ĉar en la ŝtona kastelo  
Mia suferas amanto.

Se mi nur havus plumeton,  
Skribus leteron mi al li,  
Ed vi lon portus ed lasus  
Sur la fenestron elfali.

Sed nek papero, nek plumo,  
Por skribi al la amanto,  
Flugu ed tie salutu  
Lin de mi en via kanto.

František Lorenc.



83.

### Kje dom' al mi?

(Bohema kanto nacja.)

Kje dom' al mi, patr'jo de mi?  
Akvoj fluas tra herbaroj,  
Montojn beligas arbaroj,  
La ĝardenon multa flor'!  
Paradiz' por sento, kor':  
Tiu tero, bela tero,  
La Bohem'jo patr'jo-ĉi.

Kje dom' al mi, patr'jo de mi?  
Ĉu vi tiun teron konas,  
Kie kantoj ĉiam sonas,  
Kie sana la anim',  
Kie sencoj sen la tim'?  
De popolo tiu tero:  
La Bohem'jo patr'jo-ĉi.

František Lorenc.



84.

## La libro de-l' naturo.

(El B. Jablonský.)

Estas unu granda libro,  
Kiun skribas mem la Di',  
Granda libro de-l' naturo  
Estas sankta nom' de ĝi.

Se vi havas sentan koron  
Legu diligente ĝin,  
En literoj loaj lernu  
Koni Dion, mondon, sin.

František Lorenc.



85.

## La vero.

(El Kollár.)

Frat' ne malesperu, se stariĝas  
Malamika kontra' vin envi';  
Ne fidela al la ver', al si,  
Kiu defendante lon, timiĝas.

Vero ne deŝtupas, se leviĝas  
Eĉ la tuta mondo kontra' ĝi.  
Laŭdas lon la malamika kri'  
Ed de insultado lo beliĝas.

Ver' al Liban-cedroj similiĝas,  
De la enblovantaj ventoj nur  
Bonodor' agrabla disvastiĝas.

Loa lang' — glav' estas, brusto — monto,  
Kor' — marmoro, mano — firma tur',  
La piedo — rok' sur kontra'onto.

František Lorenc.



86.

## La vivo eterna.

De K. R.\*

Mi ne kredas, ke ne portos  
Ni pri vivo rememoron  
En la ĉerkon, kiam mortos,  
Kiam finos vivlaboron.

La okuloj ĉu kovriĝos,  
Ed foriros la aŭdado?  
Ed memoro ĉu foriĝos  
En spirita liberado?

Ĉu «Madona'n» ne ekscias  
En ĉieloj la pentristo?  
Tie ĉu ne opinias  
Pri Hamlet' poeziisto?

Tio-ĉi ne ebla estas;  
Sankta ĉio, bela ĉio  
Ank' al ni agrabla restas,  
Kjam al ni sin montras Dio.

Vladimir de Majnov.



87.

## Preĝo.

(El G. Giusti.)

Al la animo premata  
De dubo, timo, doloro,  
Venu al helpo, Sinjoro,  
Kun de la kredo radi'.

Levu la pezon d'animo  
Kiu en marĉon l'on tiras;  
Al Vi mi plendas, sopiras;  
Min rekomendas al Vi!

Vi scias, ke vivo mia  
Iom post iom foriĝas;  
Kjel vakso de fajr' fluiĝas  
Kiel la neĝo en sun'.

Al la animo volanta  
Flugi al Vi, ĉirka'prenon,  
Rompu, Sinjoro la ĉenon  
Kiu lon tenas ĝis nun.

Dr. Daniele Marignoni.



**La riĉo ankoraŭ ne feliĉo.**

(De A. Paravia.)

Virineto, vi en kampa  
 Haltas humila laboro,  
 Ed rigardas kun fervoro  
 Post kaleŝ' fluganta for!

Vi nur vidas la flamecon  
 De kurantaj la ĉevaloj,  
 Vidas fulmon de kristaloj,  
 Vidas brilon de la or' ;

Sed ne vidas vi interne  
 Flanke de-l' sinjor' sidantan  
 Zorgon, akre lin pikantan,  
 Kiam kuras, staras li.

Se nur povus l'on ekvidi,  
 Vidus l'okulo aminda:  
 Ol kaleŝ' pli estiminda —  
 Kara malriĉec' de vi.

Dr. Daniele Marignoni.

**Mi amis Vin.**

Mi amis Vin! Senkore Vi ne vidis  
 Varmegan, puran mian amon.  
 Konfesis mi — sed tiam Vi nur ridis  
 De-l' am' unua koran flamon!



Ed longe mi suferis . . . Vin, amita,  
Mi ne forgesis; sed en koro  
La flama amo estas estingita,  
Pri l'o nur restis rememoro.

Sed kial Vi, mi petas al mi diri,  
Pasintan en mi amon movas?  
Por nove ridi? koron mian ŝiri?  
Ne, mi suferi pli ne povas!

Ne povas mi . . . ĉar multe mi suferis;  
Kor' malvarmiĝis de-l' doloro;  
Ĉar ami mi jam tute malesperis,  
Ĉar kredi Vin ne povas koro.

Aleksander Naumann.



90.

### Printempo venos.

Se la naturo rigidiĝas  
De prem' de-l' vintro frostiganta,  
Se tute per la neg' kovriĝas  
Je longe tero ekdormanta,  
Amiko kara! vi ne ploru:  
Printempo venos ed somero,  
Ke la naturo ree floru,  
Ke verdu, reviviĝu tero.

Aleksander Naumann.



## La mirinda Liro. \*)

(Mirrakonto.)

En tempo longe jam pasinta  
 En malproksima urbo, foje  
 De liroj estis majstr' vivinta.  
 Post laborado longa, ĝoje  
 Li liron faris, liro lia  
 Bonsona estis, harmonia. .

Mem liro el arĝento estis  
 Ed kordojn havis lo el oro;  
 Por tia liro bezonestis  
 Ne diligenta nur laboro,  
 Sed mult' da mono. Majstro kion  
 Nur havis, li elspezis ĉion.

Majstr' ludis liron. Ĉiuj homoj  
 Kun ravo liron aŭskultadis;  
 Popoloj kun diversaj nomoj  
 Aŭskulti liron aliradis.  
 Majstr' ĉiam ludis, homoj aŭdis  
 Ed purakore liron laŭdis.

---

\*) Alegorjo, skribita en la fino de-l' 1891 j., kiam nia afero estis en danĝero. Dank' al S-ro Trompeter, kiel oni scias, la danĝero estis forigita.

A. Gr.

Kantadis liro pri turmento,  
Pri am', doloro ed pri ĝojo,  
Pri orient' ed okcidento,  
Pri nord' ed sud', pri viva vojo,  
Pri Dio ed anĝeloj liaj  
En sonoj belaj, harmoniaj.

Ed anoj de diversaj bordoj  
Kantadon liran komprenadis,  
Ed inter si per loaj kordoj  
Popoloj ĉiuj paroladis:  
Laŭ vol' al lir' ĉiu aliris  
Ed tintis, kion li deziris.

Je unu tia la kolekto  
Da el diverse alirantoj,  
Aparte liro kun efekto  
Kantadis siajn mirajn kantojn.  
Je fino majstro mem eliris  
Ed per la liro jene diris:

— «Amikoj! Multajn, multajn jarojn  
Mi liron tiun-ĉi preparis;  
Labor' grizigis miajn harojn,  
Mi tamen liron karan faris.  
Por kiu? Por mi? Ne, la liro —  
Tutmonda estas lo akiro!

Sed liraj kordoj, vidas ĉiuj  
Ankor'e longe ne eltenos . .

Mi petas, geamikoj, kiuj  
Jam apudestas ed alvenos,  
Rimedojn al mi tuj vi donu,  
Ke mia lir' eterne sonu! —

Silentas ĉiuj kun malĝojo  
Neniu ja respondi volas;  
Ed tiam majstr' je dua fojo  
Ankor' pli laŭte ekparolas:  
— «Al lir' mi donis monon, vivon,  
Animon . . . . unuvorte ĉion.

Ĉu vi nenion doni povas,  
Ĉu vi domaĝas la trezorojn?  
Ĉu malfeliĉ' de mond' ne movas  
Malvarmajn, ŝtonajn viajn korojn?  
Li eksilentis; sed de-l' mondo  
Ne venis re al li respondo.

Je tria fojo kun brilanta  
Larmero en okulo klara,  
Ne esprimeble suferanta  
Por sia liro sankta, kara,  
Majstr' diris: — «Liron zorgi kiu  
El vi nur volas — prenu tiu.» —

Silento re al li respondo;  
Ekĝemis majstro ed ploregis:  
«Malvarma, sendankema mondo  
Feliĉon sian detruegis!

Ho liro mia — mia ĝojo . . .  
Ekludis majstr' je lasta fojo.

Ploreĝis liro, lir' malbenis,  
La liro bruis, liro ĝemis . . .  
Kun malespero majstr' lon tenis;  
Ed li per tuta korp' ekstremis,  
Ĉar . . . inter tio laŭ-la ordo  
Ŝiriĝis ĉia lira kordo.

Ed kiam lasta disŝiriĝis,  
La majstr' nenion tiam vortis,  
Li rompis liron, mem kliniĝis  
Ed falis . . . Majstro glora mortis;  
La mond' bedaŭris lin ed ĉesis,  
Ed nun jam tute lin forĝesis . . . .

Aleksander Naumann.



92.

## Tri palmoj.

Orjenta legendo.

(El Lermontov.)

En sablo dezerta, en tuta soleco  
Tri palmoj elkreskis kun la fiereco.  
Sub palmoj potencaj en ombra loketo  
Kuradis bruanta ed freŝa fonteto.  
Konservis lon ĉia de-l' palmoj folio  
De sablo dezerta, de suna radio.

Ed longe tri palmoj ekzistis jam tie,  
 Ed venis al ili migrant' de nenie  
 Por serĉi ripozon en ombra loketo,  
 Por trinki soife el freŝa fonteto.  
 Sekiĝi komencis de sunaj radioj  
 Fontet' murmuranta ed palmaj folioj.  
 Ed palmoj je Dio la plendon parolas:  
 «Ne, velki por ĉiam ankoraŭ ni ne volas!  
 «Ni kreskis, ni floris de vent' ŝancelataj,  
 «De suno varmega sen ĉes' bruligitaj;  
 «Dank' al ni ekĝojis rigardo nenia  
 «Ho, estas ne prava decido, Di', via!»  
 Nur plendon ĉesigis la palmfoliojaĵo,  
 Sabl' ora leviĝis en malproksimaĵo;  
 Ed sen harmoni' sonoriloj sonadis —  
 Kamel' post kamelo balance iradis  
 (Kiel en profunda la maro — ŝipeto)  
 Jen rekte al palmoj, al freŝa fonteto.  
 Kolora tend' inter ĝibegoj de besto  
 La dorson kamelan kovradis; en vesto  
 En blanka, manetoj 'stis brunaj montrataj  
 Ed duoj da nigraj okuloj vidataj...  
 Ed rajdis Arabo sur nigra ĉevalo  
 Kun la ponardegò, farita el ŝtalo.  
 Kjela tigro vundita, en sabla la valo,  
 Sur postaj piedoj stariĝis ĉevalo;  
 La faldoj de vest' de Arab' disblovitaj  
 Sur ŝultro kuŝadis sen ord', disĵetitaj.

Vidinte fonteton, kun fajfo ed kanto  
 Ĵetadis kun ĝoj' ponardegon rajdanto.  
 Ed al karavano laŭ lia supozo  
 Sub palmoj prezentis sin bela ripozo.  
 Ed kruĉoj per akvo pleniĝis, sonante;  
 Fiere la kapojn belegajn klinante,  
 La palmoj salutas la gastojn; ed fonto  
 Trinkigas venintojn kun plena volonto.  
 Sed kiam sur teron ekfalis vespero,  
 La palmoj majestaj kun granda sufero  
 Pereis. — La korpoj iliaj hakataj  
 Per fajr' estis ĝis la maten' bruligataj —  
 Ed ĉiu senforta, malgranda infano  
 Ŝiradis la vestojn de palmoj per mano.  
 Kjam super la mondo la suno suriris  
 La gastoj de palmoj, de fonto foriris . . .  
 Postsigno malgaja sur tero nur restis:  
 Cindraĵo malvarma ed griza lo estis.  
 Per suno bruliĝis de palmoj restaĵo,  
 Lon vento disportis en la ĉirka'ajo.  
 Nun estas ĉirka'e nur plena dezerto  
 Ed jam ne murmuras la fonto kun lerto.  
 Lo vane profeton pro ombro petadas:  
 Per sablo varmega lon vento kovradas;  
 Ed nur la dezerton vulturoj aliras  
 Ed tie akiron pinĉante disŝiras.

Aleksander Naumann.

93.

## La bovo ed la muŝo.

(El Ezopo.)

---

Foj' de laboro bovo iris —  
Sur korno muŝ' sidanta diris:  
Aŭskultu, kara! al vi se  
Mi malfacila estas, diru,  
Ke mi rapide tuj foriru.»  
La bov' respondis: «Tute ne,  
Pli frue eĉ ne sciis mi,  
Ke sur la korno sidas vi!»

Aleksander Naumann.



94.

## La kandelo.

(Fablo.)

---

«La laterno premas min,»  
— Tjel parolis la kandelo, —  
«Volas lumi, kiel' stelo,  
Mia frato sur ĉielo.»  
La latern' malfermis sin, —  
«Huh!» estingis vento ĝin.

Aleksander Naumann.





## K a n t o.

Kanto sincera de mia animo,  
 Flugu en vaston sen timo  
 Ed komuniku al homoj de-l' tero  
 Ĝojon de-l' sankta espero.  
 Homojn alvoku al paca laboro,  
 Sonu konsolon al koro,  
 Ed en brilanta bluaĵo de spaco  
 Laŭte prediku pri paco.  
 Kantu deziron de homa frateco  
 Ed de-l' homar' egaleco;  
 Sonu pri amo, pri ĉies libero  
 Per la fluganta aero.  
 Diru, ke estas jam inter la mondo  
 De kolegaro nun rondo;  
 Rondo, konstante, senhalte kreskanta,  
 Bonon al homoj donanta.  
 Tiu ĉi rondo la homojn pacigas  
 Ed per laboro kunligas;  
 El la ligilo nun estas plektita  
 Vigla la kanto invita.  
 Kanto sincera de mia animo,  
 Flugu en vaston sen timo  
 Ed komuniku al homoj de-l' tero  
 Ĝojon de-l' sankta espero!

I. Seleznet.



96.

## Revo.

---

Tre potenca lo estas, la revo fluganta,  
Ĉirka'ita de flora ornamo.  
Lo similas je nubo malluma, tondranta,  
Lo similas je lumo de amo.  
Lo allogas al maro da bluo, da helo,  
Al brilado belega de tago,  
Aŭ lo fulmojn ed tondrojn de nuba ĉielo  
Prezentadas al nia imago.  
Aŭ flugante en ia bluaĵo radia,  
Super ondoj de maro lo pasas,  
Tre belega, pasanta kun son' melodia,  
Mallumecon misteran lo lasas.  
Ed por lo ne ekzistas la spaco nek tempo,  
Ed nenio baranta ekzistas;  
Lo nin logas al floroj, al verda printempo,  
El mirinda lo sole konsistas.

I. Seleznet.

—><—  
97.

## La Poeto.

(El V. Hálek.)

---

Benita, kiun Dia mano  
Poeton eksantigis!  
Li volon Dian, homan koron,  
Profunde komprenigis.

Li konas kanton, kiun homo  
Ed kiun birdo ploras;  
Li frapon de la kor' komprenas,  
Se velkas l'o, se floras.

Malklaron de aliaj homoj  
Li vidas malfermitan;  
De Di' la filojn li kondukas  
En landon promesitan.

Emil Smetánka.



98.

## La printempo.

(El V. Hálek.)

La birdoj de la mar' revenas  
Kun veno de la varma sun';  
Ed se mi ilin ekrigardas —  
Ho! miaj pensoj estas kun!

Ed tiam estas tiel vera  
L'antikva vorto de-l' saĝec',  
Ke en aŭtuno de la birdoj  
Ed de la pensoj malriĉec'.

Ed tiam estas tiel vera  
La kara vort' por mia kor':  
Silentas la anim' kun birdoj  
Ed kun printempa kantas ĥor!

La birdoj de la mar' revenas —  
Ho! miaj pensoj estas kun;  
En mia koro vivo kreskas  
Kjel la herbaro sub la sun'.

Emil Smetánka.



99.

### Fantazo.

Ĉiutage ĉiam la deziroj,  
Ĉiutage revoj ed la revoj!  
Ofte mi ravita per la diroj,  
Kun rapido de malgrandaj mevoj

Flugas en la antikvecon gloran,  
Ed, trovante pacon tie sole,  
Kun bedaŭro tute kontra'vole  
Mi revenas en vantaĵon floran.

Leonid Sokolov.



100.

### La velo.

(El Lermontov.)

Blankiĝas velo en la maro  
Glitante sur la bluaj ondoj . . .  
Vi hejme kion lasis, kara,  
Ed serĉas en ali'j mondoj? . .

La ondoj ludas, fajfas vento,  
Ed fleksas sin ed krakas masto...  
Lo kuras, kuras de-l' kontento,  
Feliĉon serĉas en la vasto!...

Sub lo — bluaĵo estas hela,  
Ed supre — granda blua placo;  
Sed la ventegon petas velo —  
Ĉu en ventegoj estas paco!?

Leonid Sokolov.



101.

## Plendo.

Morto! . . . ĉio jam finita!  
Kie estas do feliĉo?  
Kie gloro promesita?  
Mia korpo nun — dediĉo  
Al la vermoj, al putrado;  
La animo bona, saĝa —  
La ofer' de-l' neestado!

Lon severa ed sovaĝa  
La sendanka, senmemora,  
En la tempo de vivado  
La servema ed fervora,

Senanima societo  
Ekforĝesos nun por ĉiam,  
Ed eĉ ĝemo ed larmeto  
Memorigos min neniam!...

M. Solovjev.



102.

### Laŭ sveda melodjo.

Vi parolas lingvon nekonatan,  
Ne komprenas, kion diras mi;  
Tamen, frato, kanton nun faratan  
Gaje kanti povas amb'e ni.

Ne atendu — ĉiu minuteto  
De mallonga vivo flugas for, —  
Lernu kun malmulta laboreto  
Lingvon, kiun amos via kor'!

Karl Svanbom.



103.

### Ne diru.

(El Nadson.)

Ne diru: «li mortis»,  
Li estas vivanta!  
Se oni detruis l'altaron —  
La fajro ja restis flamanta;

Se oni deŝiris la rozon —  
Do ĉiam ankore l'o floras;  
Se l'harpo eĉ estas rompita —  
L'akordo ankore do ploras.

Samuel Ŝatunovski.



104.

## Kun sia bruado . . .

(El Geibel.)

Kun sia bruado l'eterna maro,  
Kun sia murmuro la verda arbaro,  
Ĝis nun la saman kanton kantis  
Kiun je la kreado jam ili ekkantis.

Kiel ajn ŝanĝados kun tempo la mondo,  
Kiel ajn kriadus la homoj en rondo,  
Resonas l'antikva saluta ekkrio  
De ondo al ond', de foli' al folio!

Se mi pri-l' eterna nun volas pensadi  
Mi iras al la antikva arbaro,  
Staranta sur alta bordo del' maro.

Aŭdante kun bruo interparoladi  
La ondojn ed arbojn, vekigās en koro  
De-l' Dio kreinta la sankta memoro.

Eduard de Wahl.



105.

## Ĉe-l' maro.

(El Heine)

Ĉe-l' maro nigra roko grandegas,  
Sur l'o nun en songoj mi sidas.  
La vento fajfas, la mevoj kriegas  
Ed la ondoj bruantaj rapidas.

Amata de mi multa knabino,  
Ed ĝoja kolego en rondo . . .  
Kien ili foriĝis? Nur vento sen fino  
Eraras ed ŝaŭnas la ondo.

Eduard de Wahl.



106.

## Versaĵo sen fino.

Lin vidis en ĝardeno —  
Ekplaĉis li al ŝi.  
Ŝi nomis sin Helena,  
Anton' sin nomis li.

Ekamis la konato  
Ed reciproke ŝi;  
Post paso de monato  
Ŝanĝiĝis «Vi» per «ci»



Someraj tri monatoj  
Trapasis dolĉe for,  
Ed niaj geamatoj  
Jam estis kor' ĉe kor';

Ed per solena beno  
De-l' pastro en la fin'  
Antono ed Helena  
Jam estis edz'-edzin'.

En ĉarma harmonio  
Ekvivis edz'-edzin';  
Najbaroj kun envio  
Rigardis lin ed ŝin.

Sed bald'e edzo estis  
Plej malfeliĉa hom',  
Ed jam tre ofte restis  
Li ekster sia dom'.

Ed fine eksedziĝis  
Antono ed Helen';  
Belul' ia aliĝis  
Al ŝi en la ĝarden'.

Lin vidis en ĝardeno —  
Ekplaĉis li al ŝi.  
Ŝi nomis sin Helena,  
Aŭgust sin nomis li.

Ekamis la konato  
Ed reciproke ŝi ;  
Post paso de monato  
Ŝanĝiĝis «Vi» per «ci».

Someraj tri monatoj  
Trapasis dolĉe for,  
Ed niaj geamatoj  
Jam estis kor' ĉe kor'.

Ed per solena beno  
De-l' pastro en la fin'  
Aŭgusto ed Helena  
Jam estis edz-edzin'.

En ĉarma harmonio  
Ekvivis edz'-edzin';  
Najbaroj kun envio  
Rigardis lin ed ŝin.

Sed bald'e edzo estis  
Plej malfeliĉa hom',  
Ed jam tre ofte restis  
Li ekster sia dom'.

Ed fine eksedziĝis  
Aŭgusto ed Helen';  
Belul' ia aliĝis  
Al ŝi en la ĝarden'.

Lin vidis en ĝardeno —  
Ekplaĉis li al ŝi.  
Ŝi nomis sin Helena,  
Henrik' sin nomis li  
E. t. p. e. t. p. sen fino.

Feliks Zamenhof.



107.

### Frenezulino.

---

La juna, bela, vizaĝ' anĝela,  
Senkulpa, kjel infano,  
Ĉe la patrino ŝi, sol-filino,  
La helpa dekstra mano.  
Sen zorgo ia la vivo ŝia  
Fluadas sen doloro.  
Sed venis amo, la kora flamo —  
Ekfrapis ŝia koro.  
Sinjoro riĉa al la feliĉa,  
Senzorga ed nesperta  
Sopire ĝemas, la belan premas  
Li, deloganto lerta.  
De la riĉulo kun larmokulo  
Avertas ŝin patrino;  
Ne helpas varmaj admonoj larmaj —  
Jam amas la filino.

— «Filino mia! fals-amo lia  
 Por vi — nur malhonoro! . . .»  
 — Vi vane timas — li min estimas  
 Ed amas lia koro.  
 — «Sed amo lia nur papilia:  
 Elsuços koron vian —  
 Monato posos, li vin forlasos  
 Por ami duan . . . trian . . .»  
 — Ne, ne, patrino! — al ŝi filino  
 Obstine ed plorante —  
 Vi vane timas, li min estimas  
 Ripetas nur konstante.  
 — «Ne per admono, sed per bastono  
 Mi vin ekprudentigos!  
 Mi la belulon, abomenulon  
 El via kap' forigos! . . . . .  
 Ne enviinda ed ne aminda  
 Ho, estos lia sorto! . . .  
 Diabloj prenos lin, kiam venos  
 Li — nun al nia korto! —»  
 Filino staris, kun ŝultroj faris,  
 Respondon ŝi ne donis,  
 Sed en l'oreloj satan-kapeloj  
 Patrinaj vortoj sonis . . .

\* \* \*

En la ĝardeno kun lun'-elveno  
 Sur alton la ĉielan

Sur la lageto en la ŝipeto  
 Ni vidas paron belan.  
 — Ho, kara mia! ĉu amo via  
 Por mi la malhonoro?  
 Ho, diru veron ed la esperon  
 Redonu al la koro!  
 Ed kial do vi, al si por trovi  
 Amatan — la edzinon,  
 Ne el grandmondo — el vilaĝrondo  
 Preferis la knabinon?  
 En mond' ja via knabino ĉia  
 Pli bela estas, riĉa? . . .  
 Ĉu mi, sovaĝa infan' vilaĝa,  
 Mi estas plej feliĉa? . . .  
 — Mi — . . . mia koro . . . maljusta moro . . .  
 Mi . . . mi vin sole amas!  
 Ed la fidela por vi nur, bela,  
 Kor' mia tremas, flamas! . . .  
 — Kjal do detenas, kjal do malbenas  
 Konstante min patrino?  
 — Vi ne aŭskultu, ed ŝi insultu,  
 Freneza la virino!  
 — Ho, timu Dion, ne diru tion.  
 Amata, kara mia! . . . .  
 Tsss . . . . en arbeto jen ŝanceleto . . . .  
 Ŝteliĝas fremda ia? . . . .  
 — Ne, vent' ekblovis, foliojn movis,  
 Vi vane timas, tremas.

Ed la tremantan li ŝin febrantan  
 Al sia brusto premas . . . . — —  
 — Ho, malnoblulo! ha, vi krimulo! . . . .  
 Malben' al la filino! . . . .  
 Kvaz'e pantero ŝi en kolero  
 Jam naĝas, la patrino . . . .  
 Ŝi dronos eble, neeviteble,  
 Freneza en kuraĝo?  
 Sed la patrino, «frenezulino»  
 Ne dronas, malgr'e l'aĝo . . . . .  
 — Ŝi min malbenos, kiam mi venos.  
 Al la patrino korto!  
 Ne rekonatan, malestimatan  
 Min pelos for sen vorto! —  
 Ekblovis vento de oriento,  
 Alportis malvarmeton . . . . .  
 Ed la patrino, «frenezulino»,  
 Renversis la ŝipeton — —

\* \* \*

Nun la patrino — frenezulino  
 En frenezejo sidas,  
 Ed kun sovaĝo en la vizaĝo  
 Jen ploras ŝi, jen ridas;  
 Okulojn metas ed fulmojn ĵetas —  
 Kor-sangiganta homo! . . .  
 Sin turmentadas ed bataladas  
 Kun de la mort' fantomo.

— Vilaĝdometon ed ĝardeneton  
 Mi havis anta' jaroj . . . . .  
 Ed filineton belulineton —  
 Enviis min najbaroj . . . ,  
 Korpeto neĝa, teniĝo reĝa . . . .  
 De ĉielruĝ' infano . . .  
 Ha malnoblulo! . . . ha, vi, krimulo!  
 Infera vi satano! . . .  
 En la ĝardeno laĝeto plena . . . .  
 Ho, neenterigita . . . .  
 Mi ŝin mortigis, mi ŝin dronigis . . . .  
 Patrin' frenezigita!  
 Mi'. — — —  
 Ha! satano — for de-l' infano! . . .  
 Ha, ha! . . . . «frenezulino»? . . . .  
 — — — — —  
 Ŝi ekkriegis — sang' elŝprucegis  
 Ed — mortis la patrino . . . . .

Feliks Zamenhof.



## 108.

### Vizito de la steloj sur la tero.

Ĉiuj steloj ekdecidis  
 Ekvojaĝi sur la teron.  
 Al mastrino ili diris  
 Sian volon ed esperon:  
 «Ni ja tie tre mallonge  
 Gastos — unu, du monatojn;

Ni vizitos regnon homan,  
Vidos niajn koramatojn . . . »  
Sed mastrino al la steloj  
Tiam donis la respondon:  
« Restu tie-ĉi en domo —  
Vi malbenos poste mondon! »  
Saĝajn vortojn ne aŭskultis  
Tamen steloj la trudemaj  
Ed senĉese ili tedis  
La mastrinon — nespertemaj:  
« Sed komprenu nin, mastrino,  
Sur ĉielo ni sidante  
Tute ja ne konas tiujn,  
Kiuj kantas nin konstante!  
Ĉiu ja el ni sur tero  
Havas siajn adorantojn,  
Kiuj sendas al ĉielo  
Himnojn, ĝemojn, amokantojn! »  
— « Vere », diris la mastrino,  
» Ili kantas Vin laŭdinde;  
Sed, Vin ili ne konante,  
Vin adoras ja — en blinde!  
Ili dum Vi sur ĉielo,  
Ĵuras ami Vin eterne,  
Ĉar neniu ja atingos  
Lo kaŝitan en interne!  
Se Vi tamen volas scii  
Malfeliĉan Vian sorton,



Iru — sed Vi rememoros  
Mian nunan patran vorton». —  
Ed la steloj al vojaĝo  
Tuj pretigis sin kun ĝojo, —  
Ed jen bald'e ili estis  
Al la tero sur la vojo . . .

\* \* \*

Kiam aŭdis nun la tero,  
Ke atendas l'on honoro,  
Ĉie en plej dolĉaj tremoj  
Tuj ekbatis homa koro.  
Tuta tera junularo  
De la ĝoj' ne sciis finon  
Ed sen pacienc' atendis  
Ĉiu sian amatinon.  
Ĉiu kantis, ĉiu saltis  
Kun feliĉ' en la mieno,  
Ke li havos de proksime  
«Ŝin» en sia ĉirka'preno.  
Ĉiu homo dankas Dion  
Ĉiu benas la ĉielon,  
Ke li fine nun ekkonos  
Sian karan, sian stelon!

\* \* \*

Dum la tera junularo  
Estas plena de espero

Belaj steloj de-l' ĉielo  
Alveturis al la tero.  
Tuj sin ili jam dismetis  
En plej granda la hotelo;  
Ĝis vespero ĉe la pordoj  
Ĉiuj staris — sed sen celo.  
Je-l'vespero ili aŭdis,  
Ke gastinoj la belegaj  
Morg'e montros sin matene,  
Nun estante tro lacegaj.  
Tiam tre malĝojigitaj  
Ĉiuj iris for la domon;  
Post mallonge la Morfeo  
Ĉirka'prenis ĉiun homon.  
Kio estis en la songo,  
Ni priskribi eĉ ne provos,  
Ĉar ni sentas, ke precize  
Tion fari ni ne povos.  
Ni en tiu-ĉi loketo  
Iom nur priskribi volas,  
Kiel . . . tamen tss! mi aŭdas,  
Oni el la song' parolas:  
«Ho, vi! . . . ho, vi! . . . mia bela,  
Mia kara, ho, Helena! . . .  
Viaj kisoj ed karesoj»  
Unu preĝas al kuseno.  
Ed alia, flamemulo,  
Ŝin jam havas ĉe-l' altaro,

Ed solene — en la lito —  
 Sonas ĵura promesaro . . .  
 — «Ho! . . . karega . . . ho, anĝelo,  
 Fianĉino . . . ho, Maria! . . .  
 Mia vi nun je eterne,  
 Anta' homoj, anta' Dio!»  
 Tiel li karesas, ĵuras  
 Amon veran ed brulantan,  
 Tiel kisas tiu homo . . .  
 Lampon apud li starantan.  
 Sed subite al li ŝajnas,  
 Ke Maria'n iu tenas  
 Ĉirka'prene! . . . «Ho, pro Dio! . . .»  
 (Lampon tuj diabloj prenas).  
 Ed cetere, ed cetere  
 Daŭris tio ĝis mateno. —  
 Elrapidas el la domo  
 Ĉiu freŝa kun mieno.  
 La gastinojn de-l' hotelo  
 Ni jam vidas sur la stratoj,  
 Ed jen bald'e promenadas  
 Brak' en brak' la geamatoj . . .  
 Sed neniu tie aŭdas  
 De la amo dolĉan vorton!  
 Ĉiu el la junularo  
 Nun malbenas sian sorton . . .

\*

\*

\* -

Kio faris tian ŝanĝon,  
Ke anta'e tre amataj  
Steloj, tiel deziritaj —  
Nune estas malbenataj?  
Kio faris, Vi demandas,  
Tian ŝanĝon nun subitan?  
Kio kaŭzis malfeliĉon  
Ed esperon renversitan?  
Ĉefa kaŭzo, ke malbenoj  
Nun el ĉies buŝo sonis,  
Estas — ke la «stelon» ĉiu  
Pli proksime, pli ekkonis . . .

\* \* \*

Ĉiuj steloj ofenditaj  
Forveturis la ĉielon  
Ed post kelkaj larmaj tagoj  
Jam atingis sian celon.  
— «Saĝa nia stelmastrino!  
Sankta estis via vorto!  
Prenu nun la tutan teron  
La diabloj ed la morto!  
Tamen kiel vi, mastrino,  
Anta'sentis nian sorton?  
Kio gvidis vian saĝan  
Ed profetan vian vorton?»  
— «Se Vin iu ne rigardas  
Tra ĉieloĵ tra speguloj,

Sed rigardas Vin per sobraj  
Ne trompantaj sin okuloj, —  
Tiu vidos ja sendube,  
Ke amata lia «stelo»  
Estas sen la luma krono  
Nur diablo — ne anĝelo.

Feliks Zamenhof.



109.

## Vespero.

(El K. A. Nikander.)

Benite vi venas, vespero,  
Vi klara, trankvila, al ni!  
Pleniĝas la kor' de espero;  
Feliĉon ni havas de vi.

Kun oraj flugiloj anĝelo  
Malsupren venetas vesper':  
Vivantojn pacigas ĉielo  
Ed donas ripozon al ter'.

Filino de nokto ed tago,  
Konsola, paciga liber'!  
Jen! bele sur akvo de-l' lago  
Pentriĝas ĉielo ed ter'.

Vi pentras bluantajn montetojn,  
Kverkaron brilantan en or';  
Vi kisas ruĝantajn rozetojn,  
Dormetas senzorge la flor'.

Ed birdo libere ĝojadas,  
Espero fidela en li,  
La «Ave Maria'n» kantadas  
En valo li en harmoni'.

La ter' per mallumo kovriĝas,  
Pensema amik'; kion pli?  
La sun de ĉiel' malleviĝas,  
Sed morg'e revenos al ni.

Lo sidas sur nubo, la brila,  
Kaŝita en la okcident';  
Tuj, homan esperon simila,  
Tuj levos sin en l'orient'.

Pleniĝas nun kor' de espero,  
Feliĉon ni havas de vi!  
Vi klara, trankvila vespero,  
Benite vi venas al ni.

Otto Zeidlitz.



## Galileo.

(El Konopnicka.)

(1633.) Interna plac' en palaco de-l' sendito Toskana en Roma. Sur balkono en granda seĝo ripozas Galileo; apud li genuiĝas filino. Castelli, lernanto de-l Galileo, rigardas per teleskopo estingiĝantajn stelojn. Matena brilo en fino de-l' nokto somera.

Castelli (montrante Galileon.)

Dormas?

Filino.

Ankore.

Castelli.

Kion povas sonĝi

De-l' nokto lasta en lastaj momentoj

Pala maljun'-ĉi . . .

Filino.

Proksimu! Mi diros:

Li sonĝas nun, ke pli jam granda Dio

Ne havas tronon de-l' ĉiopoveco

Sia eterna en blua larĝaĵo . . .

Ke fort' malbona per plumbo varmega

Plenverŝis ĉiujn buŝojn, kiuj povas

Veron ekvoĉi . . . ke penson flugantan

En rond' de-l' mondo, kjel spir' de homaro,

Premis per manoj, detruis per pjedoj

De-l' teruriga ruĝa mortigisto . . .

Ke por spirit' pli ne 'stas leĝ', libero . . .  
Lon songas . . . ed kun li ank' hodje songas  
Lon Roma tuta . . . ha! ed mondo tuta! . . .

### Castelli.

Ho, sinjorino! doloro Vin venkas;  
De-l' eterneco idealoj klaraj  
Tuj ne perdiĝas, kiam batalanto  
Unu ekfalas; tio n'estas inda  
De-l' granda homo, fortunon de-l' vero  
Per sia propra fortuno mezuri;  
Super teraĵo de-l' mizer', bataloj  
De ter' tiu-ĉi — estas porto ie  
De trankvileco ed lum' por l'animo;  
Ed la centjaroj kun aglajflugiloj  
Skuantaj, iam disŝiros la ĉenojn  
De mallibero, ed trinki ekflugos  
Tie el viva rivereto klara . . .  
Ĉar homo falas, — ver' estas eterna!

### Filino.

Eterna estas . . . ha, jes! . . . por eternaj . . .  
Mi kion havas, ke ie, je sfero  
D'esteco nia, je ordoj nubigaj  
De centojaroj, la ver' ia estas  
Ver' absoluta ed senparolanta —  
Per sia fort', grandeco . . . sendanĝera,  
Kiu rigardas sen larmoj, sen tremo,  
Kiel homaro profundajon flugas, —



Sunon . . . matenon . . . ne povante vidi? . . .  
Mi, kion havas? . . . mi tie-ĉi hodje  
Pensojn ŝancelas, . . . suferas . . . ed mortas. . .  
Se vero estas, tondro lon parolu,  
Aŭ en eterno suno estingiĝu!

(kun doloro)

Lo mia patro! mi volas lin vivan!  
Amas lin! . . . aŭdas Vi?

(malfortiĝante)

Ha, kompatiĝu!

Diru, Vi kredas? . . . Rigardu! Mateno  
Apud malvarma la Tibro vekita  
Distuŝas tiujn blankajn harojn liajn . . .

Castelli.

Iam la gloron de tiu-ĉi frunto  
Centjaroj voĉos — ed milionaj homoj —  
Ed tiam vero estos ekprenita.

Filino.

Ha! pli trankvile! . . . Vekiĝas . . .

Galileo (en sonĝo)

. . . Ĝordano

Bruno . . .

Filino.

Ha, patro! patro! . . . kiaj vortoj . . .  
Lo sonĝ' terura! . . .

Castelli.

Li sonĝas grandecon!

Filino.

(Tuŝas lian manon)

Patro vekigu!...

Castelli.

Songas, ke 'stas forta!

Filino.

Per Di'! trankvile! Vi ne havas guton

De-l' sango homa!

Castelli.

Songas senmortecon!

(Moment' de graveca silento.. Galileo vekigas.)



(1633.)

Ĉagrenan la ter',  
Kje regas mizer',  
Ho, venu spirito Dia!  
Tuj nokto ed mort',  
Malluman la fort'  
Sin verŝu la radjo Via!

Grandega river'  
De-l' Via esper'  
Preĝejon enflui volu!  
En trompa, en voj',  
Ho, Di', volon foj',  
Nekomprenita, parolu!

De-l' sango en rond'  
Kjam tremas la mond'  
Ed fajron kje sentas cia,  
Ho, estro ed Di',  
Lum' montru al ni,  
Ho, venu spirito Dia!

Leo Belmont.



# Registro de-l' enhavo.

<b><u>Belmont, Leo.</u></b>	<u>pag.</u>
<u>Mortulo . . . . .</u>	25
<u>Nokt' en la koro. (El Byron.) . . . . .</u>	25
<u>Al brusto al mia. (El Heine.) . . . . .</u>	26
<u>La preĝo. (El Lermontov.) . . . . .</u>	26
<u>Galileo. (El Konopnicka.) . . . . .</u>	148
<b><u>Bogoslavskij, P. Sergij.</u></b>	
<u>L'amo de-l' vivo . . . . .</u>	27
<b><u>Devjatnin, Vasilij.</u></b>	
<u>Printempo . . . . .</u>	29
<u>Ŝipeto . . . . .</u>	30
<u>Sciuro ed papago . . . . .</u>	30
<u>Maristoj. (El Jazykov.) . . . . .</u>	31
<u>Anĝelo. (El Lermontov.) . . . . .</u>	32
<u>Husaro. (El Puŝkin.) . . . . .</u>	33
<u>Infano de Zorgo. (El Herder.) . . . . .</u>	38
<u>Espero. (El Schiller.) . . . . .</u>	40
<u>Garantio. (El Schiller.) . . . . .</u>	41
<u>Al laboristo. (El Voss.) . . . . .</u>	47
<b><u>Dombrowski, P. Aleksander.</u></b>	
<u>Ĉu mi vivis? (El Nadson.) . . . . .</u>	47
<u>Amiko, frato. (El Nadson.) . . . . .</u>	48
<u>Mia mizero. (Litva popola kanto.) . . . . .</u>	50
<u>La malliberulo. (Litva popola kanto.) . . . . .</u>	51
<b><u>Goldberg, Mozes.</u></b>	
<u>La turo Babilona . . . . .</u>	51
<u>Nova Dio. (El Frug.) . . . . .</u>	54

**Goldberg, Mozes.**

pag

La Nimfo. (El Puŝkin.) . . . . .	61
La festeno. (El Puŝkin.) . . . . .	64
Stancoj. (El Puŝkin.) . . . . .	64
Ondoj ed homoj. (El Lermontov.) . . . . .	66
Esperanto ed Danubo . . . . .	66
Cigno, ezoko ed kankro. (El Krylov.) . . . . .	69
Guto da pluvo. (El Krylov.) . . . . .	70
Dukato. (El Krylov.) . . . . .	70
Muso ed kato. (El Krylov.) . . . . .	72
Vulpo ed lupo. (El Krylov.) . . . . .	73
Du bundoj. (El Krylov.) . . . . .	74
Az'no, kapro, urso ed simjo. (El Krylov.) . . . . .	74
Kato ed ezoko. (El Krylov.) . . . . .	77
Sturno ed kukolo. (El Ĥemnicer.) . . . . .	78
Denaro laŭdata. (Araba.) . . . . .	79
Denaro mallaŭdata. (Araba.) . . . . .	80

**Grabowski, Antoni.**

Tri Budrysoj. (El Mickiewicz.) . . . . .	80
En Svis'jo. (El Slowacki.) . . . . .	83
Al la virino. (El Krasiński.) . . . . .	84
Demando. (El A. Odyniec.) . . . . .	85
Vana plendo. (El A. Asnyk.) . . . . .	86
Al la virino. (El M. Konopnicka.) . . . . .	87
Serenado de Apollo. (El Sienkiewicz.) . . . . .	91
Revaĵo. (De P. Dalman.) . . . . .	93
La koroneto. (El bohema.) . . . . .	94
Se, tjam. (El A. Tolstoj.) . . . . .	96
Distiĥo. (Latina.) . . . . .	96
Sentenco. (El itala.) . . . . .	97
Excelsior! (El Longfellow.) . . . . .	97
La pluva tago. (El Longfellow.) . . . . .	99
La sago ed la kanto. (El Longfellow.) . . . . .	100
La renkonto de ŝipoj. (El angla.) . . . . .	100

<b><u>Grabowski, Antoni.</u></b>	pag.
<u>Sonoriloj de vespero. (El T. Moore.)</u>	101
<u>La trovo. (El Göthe.)</u>	102
<u>Saluto de maro. (El Heine.)</u>	103
<u>Embaraso. (El lo germana.)</u>	105
<b><u>Haller, Eduard.</u></b>	
<u>Mi rakontis. (El Vejnberg.)</u>	106
<b><u>Kanalošÿ-Lefler, Ferdinand de.</u></b>	
<u>Trinku vinon! (El Petöfi.)</u>	107
<u>Feliĉo. (El Petöfi.)</u>	108
<u>Kuŝas somero. (El Heine.)</u>	108
<b><u>Libeks, Rudolf.</u></b>	
<u>Latva popola kanto</u>	109
<b><u>Lojko, Ivan.</u></b>	
<u>Malgrandrusa kanto</u>	110
<u>Profeto. (El Lermontov.)</u>	111
<b><u>Lorenc, František Vlastimil.</u></b>	
<u>Alaŭdeto. (El bohema.)</u>	112
<u>Kje dom' al mi? (Bohema kanto.)</u>	113
<u>La libro. (El Jablonsky.)</u>	114
<u>La vero. (El Kollár.)</u>	114
<b><u>Majuov, Vladimir de.</u></b>	
<u>La vivo eterna. (De K. R.)</u>	115
<b><u>Marignoni, D-ro. Daniele.</u></b>	
<u>Preĝo. (El G. Giusti.)</u>	116
<u>La riĉo. (El Paravia.)</u>	117
<b><u>Naumann, Aleksander.</u></b>	
<u>Mi amis vin.</u>	117
<u>Printempo venos</u>	118
<u>La mirinda Liro</u>	119
<u>Tri palmoj (El Lermontov.)</u>	122
<u>La bovo ed la muŝo. (El Ezopo.)</u>	125
<u>La kandelo. (Fablo.)</u>	125

<b><u>Seleznet, I.</u></b>	<b>pag.</b>
<u>Kanto</u> . . . . .	126
<u>Revo</u> . . . . .	127
<b><u>Smetànka, Emil.</u></b>	
<u>La poeto.</u> (El V. Hálek.) . . . . .	127
<u>La printempo.</u> (El V. Hálek.) . . . . .	128
<b><u>Sokolov, Leonid.</u></b>	
<u>Fantazjo</u> . . . . .	129
<u>La vélo.</u> (El Lermontov.) . . . . .	129
<b><u>Solovjev, M.</u></b>	
<u>Plendo</u> . . . . .	130
<b><u>Svanbom, Karl.</u></b>	
<u>Laŭ sveda melodjo</u> . . . . .	131
<b><u>Ŝatunovski, Samuel.</u></b>	
<u>Ne diru!</u> (El Nadson.) . . . . .	131
<b><u>Wahl, Eduard de.</u></b>	
<u>Kun sia bruado.</u> (El Geibel.) . . . . .	132
<u>Ce-l' maro.</u> (El Heine.) . . . . .	133
<b><u>Zamenhof, Feliks.</u></b>	
<u>Versaĵo sen fino</u> . . . . .	133
<u>Frenezulino</u> . . . . .	136
<u>Vizito de la steloj</u> . . . . .	140
<b><u>Zamenhof, D-ro. Ludvik.</u></b>	
<u>Al la Esperantisto</u> . . . . .	5
<u>L'Espero</u> . . . . .	6
<u>Al la fratoj</u> . . . . .	7
<u>Mia penso</u> . . . . .	10
<u>Ho mia kor'</u> . . . . .	11
<u>La vojevodo.</u> (El Mickiewicz.) . . . . .	12
<u>La rozeto.</u> (El Göthe.) . . . . .	14
<u>En nord'.</u> (El Heine.) . . . . .	15
<u>En songo.</u> (El Heine.) . . . . .	16
<u>Lorelej'.</u> (El Heine.) . . . . .	16
<u>Kanto de studentoj</u> (Gaŭdeamus) . . . . .	18

<b>Zamenhof, D-ro. Ludvik.</b>	pag.
<u>Al la Reĝo . . . . .</u>	<u>19</u>
<u>Nokta kanto de soldato. (De Hauff.) . . .</u>	<u>20</u>
<u>Kanto de-l' ligo. (De Mozart.) . . . . .</u>	<u>21</u>
<u>La Kapelo. (El Uhland.) . . . . .</u>	<u>22</u>
<u>La gaja migranto . . . . .</u>	<u>22</u>
<u>La vojo. (De B. Delvig.) . . . . .</u>	<u>23</u>

**Zeidlitz, Otto.**

Vespero. (El K. A. Nikander.) . . . . .	146
---	-----





# LITERATURO

## de la Lingvo Internacia Esperanto.

N-ro	Nomo de la verko :	Kosto :
1.	<b>D-ro Esperanto.</b> Mejdunarodnyj Jazyk. Predislovie i Polnyj Uĉebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) . . . . .	40 centim.
2.	— Jezyk Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) . . . . .	40 cent.
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) . . . . .	50 cent.
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) . . . . .	50 cent.
5.	<b>R. Geoghegan.</b> Dr. Esperanto's Internat. Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) . . .	50 cent.
6.	<b>D-ro Esperanto.</b> Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto por Rusoj . . . . .	8 cent.
7.	— por Polonoj . . . . .	8 cent.
8.	— por Francoj . . . . .	8 cent.
9.	— por Germanoj . . . . .	8 cent.
10.	— por Angloj . . . . .	8 cent.
11.	<b>D-ro Esperanto.</b> Dua Libro de-l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto) . . . . .	65 cent.
12.	<b>D-ro Esperanto.</b> Aldono al la Dua Libro de-l' Lingvo Internacia (en Esperanto) . . . . .	25 cent.
13.	<b>Hanez.</b> Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) . . . . .	50 cent.
14.	<b>A. Grabowski.</b> La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto) . . . . .	40 cent.
15.	<b>L. Einstein.</b> La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltspracheproblems. Vorwort, Grammatik u. Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss . . . . .	1 fr. 25 c.
16.	<b>N. N.</b> Rusa traduko de la «Dua Libro de-l' Lingvo Internacia» . . . . .	65 cent.
17.	<b>D-ro Esperanto.</b> Plena vortaro rusa-internacia . . . . .	2 fr. 50 c.


N-ro	Nomo de la verko:	Kosto:
18.	<b>N. N.</b> Rusa traduko de la «Aldono al la Dua Libro»	25 cent.
19.	<b>A. Grabowski.</b> La Gefratoj. Komedjo de Goethe (en Esperanto).	40 cent.
20.	<b>L. Einstein.</b> Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia . . .	65 cent.
21.	<b>D-ro Esperanto.</b> Meza vortaro internacia-germana . . .	65 cent.
22.	<b>Henry Phillips, Jr.</b> An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto, translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international Vocabulary compiled by the translator . . .	1 fr. 25 c.
23.	<b>Hanez.</b> Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana. . . . .	50 cent.
24.	<b>G. Henriclundquist.</b> Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) . . . . .	50 cent.
25.*	<b>A. Demonget.</b> Internacia ou Volapük?	
26.	<b>E. de Wahl.</b> Vortaro Esperanto-hispana . . .	8 cent.
27.*	<b>G. Henriclundquist.</b> Vortaro Esperanto-sveda.	
38.	<b>Klubo Nurnberga.</b> La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche	65 cent.
29.	<b>R. Libek.</b> Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva). Lettisch	1 fr. 50 c.
30.	<b>E. de Wahl.</b> Princino Mary. Rakonto de Lermontov (en Esperanto). Kajero N-ro 1 . . .	56 cent.
31.	<b>Adresaro</b> de la Esperantistoj, kajero N-ro 1 . . .	25 cent.
32.	<b>Marietta Frollo.</b> Vortareto Esperanto-rumana	8 cent.
33.	<b>Chr. Nielsen.</b> Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro der lingvo Esperanto. Eldono dana) . . . . .	65 cent.
34.	<b>M. S. Bogdanov.</b> Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) . . . . .	1 fr. 25 c.
35.	<b>Dr. D. Marignoni.</b> Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala). . . . .	65 cent.
36.	<b>J. Rodriguez Huertas.</b> Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana . . .	50 cent.

N-ro	Nomo de la verko :	Kosto :
37.	<b>A. Grabowski.</b> Kondukanto internacia de-l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto)	75 cent.
38.*	<b>A. Zinovjev.</b> Mejdunarodnyj jazyk «Esperanto».	
39.	<b>Fr. Vl. Lorenc.</b> Uplna učebnice mezinarodni reči dra. Esperanta. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) . . . . .	65 cent.
40.	<b>D. Gurevič.</b> Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta . . . . .)	50 cent.
41.	<b>L. Zamenhof.</b> Vsemirnyj jazyk Esperanto. Polnyj učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) . . . . .	25 cent.
42.	<b>Wörterbuch</b> der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia . . . . .	65 cent.
43.	<b>Die Weltsprache Esperanto.</b> Vollständiges Lehrbuch nebst 2 Wörterbüchern (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Germanoj) . . . . .	25 cent.
44.	<b>A. Grabowski.</b> La Nova Jaro, de Boleslav Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz (en Esperanto) . . . . .	50 cent.
45.*	<b>Ludwig Meier.</b> La Lingvo Internacia Esperanto.	
46.	<b>V. V. de Majnov.</b> Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj, de K. R. (en Esperanto) . . . . .	65 cent.
47.*	<b>A. Dombrovski.</b> Lingvo internacia de D-ro Esperanto, eldono litva. Mokintuve terptautizkos kalbos D-ro Esperanto.	
48.*	<b>V. B.</b> Parolo pri la lingvo Esperanto en la Muroma Muzika-Drama Societo.	
49.	<b>I. Lojko.</b> 50 Elektitaj Fabloj de Ezopo (en Esperanto) . . . . .	50 cent.
50.*	<b>V. L. Kravcov.</b> Vsemirnoje djelo.	
51.	<b>Cl. Adelsköld.</b> «L'Espero», hymne dans la langue nouvelle «Esperanto», mis en musique	75 cent.
52.	<b>R. Geoghean.</b> The Universal Language Esperanto. Complete Instruction Book with two Vocabularies . . . . .	30 cent.
53.	<b>L. de Beaufront.</b> Manuel Complet de la Langue Internationale Esperanto avec double vocabulaire	50 cent.
54.	<b>Regularo</b> de la societo «Espero» . . . . .	20 cent.
55.	<b>G. H. Backman.</b> Fullständig lärobok i verldsspråket «Esperanto» jemte två ordböcker. . . . .	85 cent.

N-ro	Nomo de la verko:	Kosto:
56.	« <b>Esperanto</b> ». Meĵdunarodnyj jazyk, predislovie i polnyj učebnik (lernolibro kun antaparolo por Rusoj) . . . . .	15 cent.
57.	<b>J. H. Ferreira</b> . A lingua universal «Esperanto». Methodo completo comprehendendo dois vocabularios. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono portugala) . . . . .	30 cent.
58.	<b>Dr. K. G. Klaresino</b> . Azbuka original . . . . .	65 cent.
59.	<b>Novaj Esperantistoj</b> . Serio XII. . . . .	10 cent.
60.	<b>E. Neumark</b> . La libro Ruth, el la Bibljo (en Esperanto) . . . . .	25 cent.
61.	<b>L. de Beaufront</b> . Langue internationale Esperanto, Introduction et Manuel . . . . .	15 cent.
62.	<b>Novaj Esperantistoj</b> . Serio XIII . . . . .	10 cent.

Steleto (\*) apud la numero montras, ke la signitan verkon oni nun jam ne povas ricevi.

Ekster tio-ĉi diversaj verkoj, originalaj ed tradukitaj, estas presitaj en la gazeto «Esperantisto» de la jaroj 1890, 1891 ed 1892, de kiuj jam nevia ekzemplero restis.

 Ni rekomendas la ĉiumonatan gazeton en la lingvo Esperanto

## «**ESPERANTISTO**»,

kiu kostas 2 frankojn por jaro.

— — — — —

Ĉiujn supre nomitajn verkojn ed anke la gazeton «Esperantisto» oni povas ricevi de

### **L. Zamenhof.**

#### **Varsovio, str. Novolipki N-ro 21 (Polon'jo).**

(10 centimoj = 8 pfenigoj = 4 kopekoj.) En loko de mono oni povas sendi signojn de poŝto de ĉia lando. Por la poŝta transsendo oni pagas (sen diferenco de la pezo ed malproksimeco) 10% de la nominala kosto de la libroj. Kiu aĉetas por pli grandaj sumoj per unu fojo, povas ricevi rabaton.

